

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

12 1996

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO





Kato sub ĉapelo

Foto de BAI TIGONG

---

## INTER NI

*Leginte la artikolon "Ĉu la vivo de malriĉaj urbanoj garantiata?", n-ro 3 de nia revuo 1996, argentina samideano Roberto G. Pons skribis al ni pri uzado de mononatria glutamato. Li diris: "En Eŭropo kaj Ameriko (kaj certe en mia lando), tiu produkto ne havas bonan akcepton, ĉar ĝi potencigas guston, sed povus esti danĝera por infanoj." Li diris ankaŭ: "Mi ne scias, ĉu la ĉina popolo ŝatas troan uzadon de tiu aldonajo, ĉar estas konsiderata kiel 'vivbezonaĵo' en via revuo."*

*Ni multe dankas s-ron Roberto G. Pons pro lia atentigo. Pri la demando ni konsultis fakulon, kiu opinias, ke pro diferenco de vivkulturo kaj vidpunkto pri san-protekto ankaŭ ĉinoj havas malsamajn opiniojn pri uzado de*

*mononatria glutamato. Iuj neniam uzas ĝin kaj aliaj ofte prenas ĝin pli-malpli. Ĝi ne estas malmultekosta, tamen kreskas la nombro de uzantoj. Kaj en tio speguliĝas la ŝanĝiĝo de la popola vivo.*

*Mononatria glutamato estas ekstraktita el maizo. La konsisto kaj praktika uzado montras, ke ĝi ne estas danĝera por la sano. Similan opinion havas ankaŭ la Monda Sano-Organizo.*

*Ni ne estas certaj, ĉu pli multaj homoj akceptos mononatrian glutamaton en la estonteco. Tamen evidentiĝas la tendenco, ke kun pliboniĝo de vivkondiĉoj oni preferas naturajn manĝaĵojn sen aldonajo.*


*La Red.*


# ENHAVO

- 2 *INTERNI*
- 4 Ok-jara revo realigita
- 5 Esperanto daŭre subtenata en Ĉinio
- 6 Pola kongreso altiris min
- 7 En intima Esperantujo
- 8 *ĈINAJ E-ISTOJ:*  
Vadanto en E-poezia ĝardeno
- 10 *ORIGINALE VERKITAJ:*  
Poemoj
- 12 *ESP-NOVAĴOJ*
- 13 *POR KOMENCANTOJ:*  
Naiveco
- 14 Nova paĝo de Esp-movado en Azio
- 15 Deklaracio de la Unua Azia Kongreso de Esperanto
- 16 Facetoj de la kongreso
- 17 Triumfu nia pacbatalo! (Poemo)
- 18 Pri la Unua Azia Kongreso de Esperanto
- 21 Aŭtourbo en montvalo
- 25 *NUNTEMPA BELARTO:*  
La naturo kaj homoj sub la suno
- 28 Vizito al kafo-plantejo
- 29 *LAŬ LA SILKA VOJO:*  
Antaŭ transiro de Wushaoling-monto
- 36 La infanoj retrovu siajn sensojn
- 38 Mia dektaga vojaĝo en Guangxi (II)
- 40 *TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:*  
Raporto el incendiita arbaro
- 42 *MULTNACIA ĈINIO:*  
Sinapogaj nacimalplimultaj virinoj
- 44 *POR VIA SANO:*  
Por mallaciĝo
- 45 Komforto en strateto
- 46 *KURANTAJ AFEROJ*
- 48 Fabriki ilmaŝinojn per komputero
- 49 Kiom da infanoj en tibeta familio?
- 50 *GALERIO:*  
Orkideo kaj bambuoj
- SUR LA KOVRILO:*  
S-ro Lee Chong-Yeong, prezidanto de UEA, s-ro Takeuti Yosikazu, prezidanto de KAEM, kaj s-ino Tan Xiuzhu, vicĉefredaktorino de EPĈ, en la Unua Azia Kongreso de Esperanto
- 2 Kato sub ĉapelo
- SUR LA DORSKOVRILO:*  
Antikva templo en aŭtuno

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

- 1. Granda Xing'an-montaro (p. 40)
- 2. Tibeto (p. 49)
- 3. Yuxi-subprovinco (p. 42)
- 4. Jingsha (p. 45)
- 5. Zunyi (p. 21)
- 6. Ŝanhajo (p. 18)





Plonĝisto Xiong Ni

YI XIU:

# Ok-jara revo realigita

**E**N tiu ĉi aŭgusto finiĝis la 26-aj Olimpiaj Ludoj en Atlanta de Usono. Ĉinio gajnis 16 el la 271 oraj medaloj kaj okupis la 4-an lokon en la listo de medal-gajnintaj landoj. Ĝenerale oni taksas la sportan nivelon de iu lando laŭ la nombro de medaloj gajnitaj de ĝi en grava internacia sportkunveno, kaj malmultaj estas klaraj pri la penado por ĉiu medalo. Hodiaŭ mi konigas al vi, kiel Xiong Ni (Ŝjong Ni) realigis sian revon post 8 jaroj.

Jam en 1988, en la 24-aj Olimpiaj Ludoj en Seulo, la 14-jara Xiong Ni, per siaj prezentado preskaŭ perfekta kaj movoj malfacilegaj, surprizis la plonĝan rondon de la mondo. Tamen finfine li estis venkita je 1.14 poentoj kaj gajnis arĝentan medalon. Post 4 jaroj, en la Olimpiaj Ludoj en Barcelono, li akiris nur kupran medalon pro unu maltrafo.

Ekde 1981 Xiong Ni dediĉis 15 jarojn al plonĝado kaj gajnis orajn medalojn en diversaj konkursoj, ekskluzive de la Olimpiaj Ludoj. Eble pro tio, sur lia vizaĝo ofte vidiĝis seriozeco nekonforma al lia aĝo, miksitaj kun iom da malĝojo.

Iuj opiniis, ke Xiong Ni ne plu havas forton gajni oran medalon. Krome vundo kaj malsano ofte

ĝenis lin. Tamen li ne perdis memfidon. Li volis sen bedaŭro fini sian plonĝan karieron per ora medalo de Olimpiaj Ludoj. Tiam Tan Liangde, gajninto de arĝenta medalo de trampolino-plonĝo en sinsekvaj 3 Olimpiaj Ludoj, forlasis la plonĝan teamon pro netaŭga aĝo. Por ŝtopi la mankon, Xiong Ni sin turnis de turplonĝo al 3-metra trampolino-plonĝo. Antaŭ tio Ĉinio neniam gajnis ĉampionecon de vira 3-metra trampolino-plonĝo en la Olimpiaj Ludoj, tial oni metis esperon sur Xiong Ni.

Tamen la konkuro certe estas intensa. Ĝuste por kontinue teni la ĉampionecon en tiu sporto-branĉo, la usona teamo speciale revokis Mark Lenzi, gajninton de la ora medalo en la lastaj Olimpiaj Ludoj. Kaj la ruso Dmitri Saoutine, honorita kiel "genia plonĝisto", havis grandan forton. Ankaŭ Yu Zhuocheng (Ju Ĝuoceng), samteamano de Xiong Ni, estis forta rivalo por la ora medalo. Post plenumado de difinitaj movoj Xiong Ni superis Lenzi nur je 1.7 poentoj, kaj Saoutine penis kuratingi ilin. Al kiu apartenos la ora medalo, tio restis enigmo.

Ĉiam, kiam Xiong Ni estis faronta la sekvantan movon en la finalo, li sidis sola ĉe la ekzerca naĝbaseno kaj, portante aŭdilon, sin malstreĉis per muziko. Poste

li diris: "En tia konkurso kompreneble mi estis streĉa kaj multe pensis plej ofte pri movoj anstataŭ pri ora medalo kaj poentoj." En la pasinteco li maltrafis pro tropensado pri tio. Ĉi-foje li ne volis ripeti la eraron. Ĉiu partoprenanto de la finalo devis fari 6 movojn. Kiam finiĝis la 4-a movo, Xiong Ni ankoraŭ ne estis en la unua loko. Tamen li ne perdis aplombon kaj kun granda memfido faris la lastajn 2 movojn: eksalto, transkapiĝo, turniĝo... Ĉion ĉi li faris tiel perfekte, ke la juĝantoj finfine honoris lin per ora medalo.

Ricevinte la oran medalon, Xiong Ni antaŭ ĉio telefonis al sia amatino. "Sen ŝi, mi ne estus certa, ĉu mi povas venki ĉiujn malfacilaĵojn kaj akiri la hodiaŭan sukceson. Tial mi volis, ke ŝi la unua dividu kun mi la ĝojon."

Xiong Ni fariĝis pli matura kaj memfida ol antaŭ 8 jaroj. Dank' al sia bona animstato kaj neordinara lerteco li venkis siajn rivalojn. "Eble tio ĉi estis mia lasta ŝanco partopreni mondsakalan konkurson. Por mi plej grave estas kiel eble plej perfekte montri mian kapablon." La sukcesinta Xiong Ni aspektas milda kiel antaŭe. Jes, ora medalo jam fariĝis historio, kaj la estonteco atendas lin: lerni en universitato kaj pliriĉigi la vivon. ■

# ESPERANTO DAŬRE SUBTENATA EN ĈINIO

**I**NVITITE de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), prof. Lee Chong-Yeong, prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio (UEA), vizitis Pekinon de la 25-a ĝis la 27-a de aŭgusto post sia partopreno en la 1-a Azia Kongreso de Esperanto okazinta en Ŝanhajo de la 22-a ĝis la 25-a.

Lia vizito estis tre sukcesa, kaj unu el la fruktoj de lia vizito estas, ke li havigis al Esperanto plian amikon, t.e. s-ron Ye Gongqi (Je Gongĝji), prezidanton de la Ŝanhaja Popola Kongreso kaj prezidanto de la Honora Komitato de la 1-a Azia Kongreso de Esperanto.


Dum intima renkontiĝo kun prof. Lee Chong-Yeong antaŭ la inaŭguro de la kongreso, s-ro Ye Gongqi alte taksis la noblan ideon de Esperanto, kiu pretas esti neŭtrala internacia helplingvo kaj pledas por la paca kunekzisto de la homaro. Li opiniis, ke tre necesas disvastigi Esperanton en Azio, kaj por altigi la lingvan nivelon de aziaj esperantistoj kaj akceli la uzadon de Esperanto en Azio, oni devas organizi pli da esperantistaj aranĝoj en Azio. La renkontiĝon ĉeestis ankaŭ honora prezidanto de ĈEL prof. Chen Yuan kaj respondeculoj de koncernaj instancoj de Ŝanhajo.

En Pekino prof. Lee Chong-Yeong intervidiĝis respektive kun respondeculoj de la Ĉina Eldona kaj Distribua Administracio de Fremdlingvaj Eldonaĵoj, la Ĉina Ŝtata Administracio de Eksterlandaj Ekspertoj, la ĉina Ŝtata Komisiono de Eduko kaj la Ĉina Radio Internacia. Prof. Lee alte taksis la decidon de la ĉina Ministerio de Eksteraj Aferoj, ke ekde septembro 1996 la inform-kunveno de la nomita ministerio uzos nur la ĉinan lingvon sen la angla-lingva interpretado, opiniante, ke tiu decido utilos al konstruado de nova internacia lingva ordo, por kiu UEA forte pledas. Prof. Lee ankaŭ konvinke argumentis pri la rolo de Esperanto kiel neŭtrala internacia helplingvo en defendo de la lingvaj rajtoj de ĉiuj nacioj kaj pri la propedeŭtika valoro de Esperanto en lernado de aliaj fremdaj lingvoj, kaj ricevis de tiuj respondeculoj plian komprenon kaj subtenon al Esperanto.

La Ĉina Eldona kaj Distribua Administracio de Fremdlingvaj Eldonaĵoj estas supera instanco de la redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Dum rendezuo kun prof. Lee



S-ro Lee Chong-Yeong kaj s-ro Ye Gongqi (dekstre)




S-ro Lee Chong-Yeong en EPC-redakcio

Chong-Yeong, ĝia unua vicdirektoro s-ro Zhao Changqian (Ĝaŭ Ĉangĉjan), en la nomo de ĝia direktoro s-ro Yang Zhengquan (Jang Ĝengĉjŭan), kiu funkcias ankaŭ kiel vicministro de la Informa Departemento de la Ĉina Ŝtata Konsilantaro, esprimis varman bonvenon al la prezidanto de UEA kaj kore dankis lin kaj UEA pro la forta subteno al la ĉina Esperanto-movado kaj la eldonado kaj distribuado de ĉinaj Esperantaĵoj. S-ro Zhao emfazis, ke la ĉina registaro kaj la Eldona kaj Distribua Administracio

# Pola kongreso altiris min



S-ro R. Jeremiasz tratranĉis la rubandon por la inaŭguro de la strato "Zamenhof". Tuj malantaŭ li estas s-ro S. Mandrak.



Intervjuo de polaj raportistinoj

forte subtenas Esperanton. Li esprimis ankaŭ, ke li tre volonte diskonigos la praktikan valoron de Esperanto al koncernaj registaraj instancoj kaj neesperantistaj kolegoj, por ke Esperanto estu pli subtenata en Ĉinio.

**J**AM antaŭ 30 jaroj, kiam mi estis juna kaj ekkonis Esperanton, mi revis viziti Pollandon pro ĝia riĉa kulturo, pro ĝia belega iama ĉefurbo Krakovo kaj pli pro tio, ke ĝi estas la lulilo de la internacia lingvo. Kaj mia revo realiĝis ĉi-somere.

Laŭ afabla invito de la Pola Esperanto-Asocio (PEA), mi kaj mia kolego Wang Ruixiang kun granda plezuro vojaĝis la 13-an de julio ĉi-jare al Gliwice, Pollando, por ĉeesti la 28-an Tutpollandan Esperanto-Kongreson kaj la 35-jaran jubileon de PEA-filio en tiu urbo.

Gliwice, gastiganto de la kongreso, estas konata kiel unu el la gravaj centroj de industrio, scienco kaj kulturo de Pollando. La kongreso havis lokon en ĝia Fervoja Kolegio, kiu akceptis proksimume 140 polajn samideanojn kaj gastojn el Britio, Ĉinio, Germanio, Israelo, Litovio kaj aliaj tri landoj.

En la inaŭguro s-ro Ratajczyk Jeremiasz, prezidanto de PEA, donis malferman paroladeton, kaj s-ro Stanisław Mandrak, prezidanto de PEA-filio en Gliwice, prezentis la gastojn. La inaŭguron salutis en vigla etoso reprezentantoj de la supre menciitaj landoj. Ĝin ĉeestis ankaŭ reprezentanto de la oficejo de la magistrato de Gliwice, direktoro de la Fervoja Kolegio, kaj aliaj personoj.

La sekvantan matenon la kongresanoj veturis al la stratoj "Zamenhof" kaj "Esperantistoj" por partopreni ilian inaŭguron. Dum la koruso estis kantanta "La Espero", oni tratranĉis la rubandojn kun manklakado de la ĉeestantoj.

Jam kelkajn jarojn antaŭe, PEA-filio en Gliwice prezentis al la magistrato sian ideon nomumi du stratojn lige kun la movado kaj baldaŭ ricevis ĝian

Dum konversacio kun la estraro de ĈEL, "El Popola Ĉinio" kaj la Ĉina Esperanto-Eldonejo, prof. Lee Chong-Yeong donis tre valorajn konsilojn pri eldonado kaj distribuado de ĉinaj Esperantaĵoj. Tiuj konsiloj certe helpos fari EPĈ pli alloga. ■

aprobos. Tamen la esperantistaro de Gliwice prokrastis la ceremonion ĝis aktivado de multaj samideanoj en la urbo.

Dum la kongresa semajno estis ankaŭ renkontiĝo kun tri junaj raportistinoj el polaj radioj. Multaj ĉeestantoj substrekis la praktikan utilecon de Esperanto en la kultura, eduka kaj scienca kampoj kaj pritraktis la gravecon de Esperanto en la internacia komunikado. Kaj mi prezentis la nunan aspekton de "El Popola Ĉinio" kaj montris, ke EPCĉ estas subvenciata de la ŝtato kaj ke ĉinoj aplikas Esperanton ne nur en eldonado de revuo, sed ankaŭ en tiu de libroj.

La kongresanoj ĝuis ankaŭ aliajn interesajn programerojn, kiel prelegoj, el kiuj unu faris s-ino Zofia Banet-Fornalowa sub la titolo "100 Jaroj de Esperanto-Teatro"; la teatraĵo "La Jubileo", kiun ludis ŝia edzo Jerzy Fornal en vespero; la koncerto de la koruso ĉe operejo pri verkoj de Ŝopeno, Zamenhof kaj Grabowski; vizito de malnova ercminejo en Tarnowskie Góry; nokta promenado sur Paco-strato kaj sur la placo antaŭ la urbodomo; grandaj kvizo-ludoj kun premioj; diversaj vesperoj kaj baloj.

Ĉe la ferma ceremonio s-ro R. Jeremiasz faris ferman paroladeton kaj donis insignojn al tiuj, kiuj multe kontribuis al la movado. Oni premiis la unuajn tri gajnintojn de kvizo-ludoj. S-ro S. Mandrak voĉlegis salutleterojn de Esperantaj organizoj. Kaj pola artisto Tadeo donacis al nia redakcio medalon kun sia portreto pro ĝia fruktodona laboro. La 28-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso finiĝis per komuna fotado sur la podio.

En la lasta tago de la kongreso aperis en ĵurnalo de Gliwice artikolo titolita "Kuracilo kontraŭ Babiltura Malsano", kiu raportis pri la kongreso kaj tre favoris la internacian lingvon.

En la naskiĝlando de Zamenhof poloj energie evoluigis la movadon kaj multe kontribuis al ĝi. Ili estis tre spertaj en organizado de sia kongreso, kiun mi opinias malgranda UK. Dum la semajno niaj polaj kolegoj ne krokodilis, kio estas tre imitinda por ni. Grandan dankon ni ŝuldas al la organizantoj kaj helpantoj, ke ili nin akceptis kiel honorajn gastojn kaj afable helpis, ebligante al ni bone ĝui la kongresan etoson kaj sperti la polan vivon.

Gratulon al la polaj samideanoj pro la sukceso! ■

SUN AIJUN:

## En intima Esperantujo

**K**IEL raportistino de "El Popola Ĉinio" kaj sekretario de la Ĉina Junulara Esperanto-Asocio, mi partoprenis inter la 6-a kaj la 13-a de aŭgusto 1996 la 15-an Komunan Seminarion de Junaj Ĉinaj, Japanaj kaj Koreaj Esperantistoj kaj la 83-an Japanan Esperanto-Kongreson, invitive de la Japana Esperanto-Instituto kaj la Japana Junulara Esperanto-Asocio. Pli ol 50 esperantistoj el 8 landoj ĉeestis la seminarion okazintan en Okayama, kies temo estis "Elhaŭtiĝu, krokodiloj!" Gvidite de du invititaj instruistoj, la komencantoj, kiuj konsistigis pli ol duonon de la partoprenantoj, rapide levis sian lingvo-nivelon. Ili jam kuraĝis paroli Esperante. La amika kaj libera etoso ĝuigis al mi la intimecon de Esperantujo. Kaj mi multe lernis de la organizanto, la Japana Junulara Esperanto-Asocio.

Tuj sekvis en la Hiroŝima Internacia Kongresejo la Japana Esperanto-Kongreso, kiu esprimis

la deziron de la pli ol 400 ĉeestantoj pri paco. La du-taga programo inkluzivis ekskurson, fakkunsidon, Esperanto-kurson, internacian Esperanto-ekzamenon, forumon kaj aliajn. En kunsido pri azia agado mi prezentis la ĉinan Esperantomovadon, precipe la ĉinan junularan Esperantomovadon. Samtempe mi esprimis dankon al la japanaj esperantistoj, kiuj konstante subtenis nin, kaj esperis ke Ĉinio kaj Japanio helpos unu la alian kiel antaŭe. Alia ĉina esperantistino Gu Jianhua gvidis kunsidon pri ĉinaj virinoj.

Dum la kongreso okazis io bedaŭrinda pro la manĝaĵa problemo de la hotelo. Tagmeze de la tago de malfermo dekoj da kongresanoj suferis stomako-doloron. Ili estis portitaj en hospitalon. Plejmulto el ili jam resaniĝis, sed iuj antaŭ la fino de la kongreso devis resti en la hospitalo por kuracado.

Dum tiuj tagoj mi sentis grandan intimecon de Esperantujo. Kaj kun dankemo kaj amikeco mi revenis hejmen. ■

# Vadanto en E-poezia ĝardeno

Teksto de WANG HANPING

Fotoj de LI CHUNGENG

**L**U Jixin (Lu Ĝjiŝin), esperantisto-poeto, alta kun densaj vangharoj, impresas min kiel vigla kaj entuziasma.

Li naskiĝis en intelektula familio de maŭnan-nacio en Guilin de Guangxi (Gŭangŝji). Bona edukado en la infaneco nutris lian intereson pri literaturo. Kontaktiĝinte kun Esperanto, li suriris la vojon verki kaj studi Esperantajn poemojn kaj donis al si la nomon Vadant.

Li eklernis Esperanton en la komenco de la 80-aj jaroj, kiam li laboris en maŝinfabrika. En 1981 li partoprenis Esperantan simpozion en najbara provinco. Li unuafoje kontaktiĝis kun tiel multaj e-istoj, kaj la kohereco de e-istoj kaj la vivipoveco de Esperanto profunde impresis lin. Infektite de la etoso de la simpozio, li verkis sian unuan E-poemon. Kvankam ĝi ne estis matura, tamen li magnetiziĝis de E-poezio.


Reveninte de la simpozio, Lu Jixin komencis serioze lerni kaj aktive propagandi Esperanton. Por rapide altigi sian lingvan nivelon, en 1984 li veturis al Yunnan por lerni Esperanton en E-kurso funkciigata de Yunnan-universitato. Li forlasis sian okupon kaj perdis vivrimedojn. Liaj parencoj laŭeble monhelpis lin, ke li plenumis la dujaran lernadon. Dum la lernado li kompilis "Konsonanca Terminaro en Esperanto" kun 2 000 radikoj kaj 6 000 artikoloj.

Fininte la lernadon, li partoprenis la 71-an UK en Pekino. Poste li absorbiĝis en verkado, tradukado kaj studado de E-poemoj kaj verkis la disertaĵojn "Pri mozaikrimo en Esperanto", "Pri Aliteracio en Esperanto" kaj "Invit' al Ĉinesko".

En 1988 li eklaboris en iu aŭtoriparejo kaj poste en fabriko de elektroaparatoj, funkciigata de lia frato. En tiu periodo li kompilis "Onderoj el Lijiang-rivero" kaj aliajn du kolektojn de poemoj. Liaj poemoj publikiĝis en iuj E-revuoj, ĉinaj kaj alilandaj. Li ĉinigi iujn E-poemojn kaj kompilis ĉina-Esperantajn broŝurojn, kiaj "Elektitaj poemoj de Zamenhof", "Elektitaj tradukoj de E-lirikaĵoj" kaj "Elektitaj tradukoj de nederlandaj poemoj".

Krom verki kaj traduki poemojn, Lu Jixin ankaŭ studis tradukadon kaj verkadon de E-poemoj kaj verkis pli ol dek disertaĵojn. Antaŭ kelkaj jaroj li studis la originalan poezian formon de maŭnan-nacio kaj aperigis en iu universitata bulteno la disertaĵon "Invit' al Maŭnan-esko" el pli ol 30 000 ideogramoj. Li multe studis la ĉinajn poeziajn melodiojn, laŭ kiuj li verkis dekojn da E-poemoj. Lastjare nederlanda eldonejo enlistigis lian "Invit' al Ĉinesko" en la serion de VoKo-numeroj.

En 1991 li partoprenis la 76-an UK en Bergeno, Norvegio, kaj post la kongreso vizitis 9 landojn. En Eŭropo li faris du prelegojn pri



S-ro Lu Jixin en fotado

E-poezio kaj verkis pli ol 30 poemojn.

En 1992 li komencis eldoni la periodaĵon "Traduk-Ĝardeno" kun E-poemoj kaj artikoloj pri Esperanto. Li kopiis pli ol 50 ekzemplerojn de ĉiu numero kaj sendis ilin al E-amikoj. Ĝis nun aperis jam 15 numeroj.

Dank' al la helpo de pluraj fervoraj e-istoj, precipe de nederlanda samideanino Inek, li senhezite iris la Esperantan vojon ĝis hodiaŭ. En 1995 li fondis la komercan firmon Vadant, kiel ĝia ĝenerala direktoro. Tio fundamentis materian bazon por lia verkado kaj studado. Li faras komercadon cele finance helpi sian Esperantan verkadon kaj aktivadon. Li iam monhelpis la eldonadon de "Penseo".


Liaj ŝatokupoj, kiaj *vejĉi*-ludo kaj fotado, ne nur riĉigis lian vivon, sed ankaŭ inspiris lin en la Esperanta verkado. Ĉiutage li legas du horojn dekojn da periodaĵoj. Ĉiufoje, kiam lia foto aperis, li aldonis al ĝi poemon en la ĉina lingvo kaj Esperanto.

Lastatempe li plenumis la verkadon de Esperanta poemaro en maŭnan-esko. Por la Unua Azia Kongreso de Esperanto li verkis multajn ĉina-Esperantajn poemojn.

Tradukado, verkado kaj studado de Esperantaj poemoj alportis al li ĝojon kaj igis lian vivon signifoplena. Li esprimis, ke li pli diligente prilaboros tiun ĝardenon. ■



S-ro Lu Jixin  
(dekstre) kaj hispana  
samideano (meze)



S-ro Lu Jixin en *vejçi-*  
konkurso dum la  
Unua Azia Kongreso  
de Esperanto

S-ro Lu Jixin gastas  
en sveda familio.



# Poemoj

de LU JIXIN<sup>1</sup>

## ELEKTI

*El multaj elektis mi iri tra vepro,  
Samtempe do ankaŭ ekportis silenton.  
Kaj mi malfacile longvadis laŭ nepro,  
Gustumis amarajn pluverojn kaj venton.  
Jen kie puŝige mi falis al tero,  
Favore leviĝas la kant' kun espero.*

*Stariĝas mi min apogante ĉe la kanton,  
Ankoraŭ la saman elektas ignore —  
La vepro multfoje faligos vadanton,  
Ĉiu paŝo ŝajnos jam palpi perkore.  
Kaj eĉ se falinte neniel mi kuŝos,  
Ĉar ĉiam la kanto min forte kortuŝos.*

## MI NE...

*Mi ne forsekiĝas sen espero,  
Kvankam mi nur guto da akver'.  
Mi por suno kantas sur rivero,  
Por fiaĵo ondas kun koler'.*

*Mi ne murmur-ĝemas sub rosero,  
Kvankam mi nematura ber'.  
Certe mi eliros el somero  
Al aŭtun-rikolto kun fier'.*

*Mi ne memriproĉas: sen konkero,  
Kvankam mi lampiro en vesper'.  
Vivoflami estas ja prefero,  
Firme strebas al la brila ver'.*

## PLUVO EN FLIRTO

*Pluvo en flirto, al mi zefir' do  
portas leteron, kiel verd-birdo.*

*Sur la paperoj kun la pluveroj,  
ridas printempo inter literoj.*

*Verdo de vivo, or-perspektivo,  
spiras en vortoj kun la naivo.*

*Freŝosufiĉa! Kiel feliĉa!  
nun mi legante jam ebriiĝa...*

*Pluvo en flirto, al vi zefir' do  
portu l' respondon, kiel gaj-birdo.*

## ELSENDI FOREN

— **Letero al fraŭlino Ineke**

*Sopiro nun el mia okul-paro  
Rapide fluas kiel la torento.  
Saluton al vi en la oriento;  
Ĉe via domo pompas floraro?*

*Verdiĝas en vi ĉina vast-kamparo,  
Kaj vi ankriĝas jam en mia sento.  
Sopiro nun el mia okul-paro  
Rapide fluas kiel la torento*

*Mi volas la sopiron iĝi laro,  
Ĉe via ŝipo flugu per la vento;  
Kaj iĝi vasta maro kun silento,  
Luladu viar: ŝipon per muaro.*

*Sopiro nun el mia okul-paro...*

## LA VIVO

*Serena ĉielo kaj splena malhelo,  
karesa mildvento, kruela torento,  
el ili konsistas la vivo.*

*Printempa la verdo kaj vintra la velko,  
la rava Edeno, terura Geheno,  
el ili konsistas la vivo.*

*Se vi opinias, ke vin ovacias  
jam ĉiu belfloro kun viva favoro  
nun vi do ne konas la vivon.*

*Se vi opinias, ke vi agonias,  
ke vivo vin trompis kaj ĉion jam rompis,  
nun vi do ne konas la vivon.*

## **MI NE VOLAS NUR**

*Mi ne volas nur  
sub la nuba kurteno  
divenadi vian radion.*

*Mi ne volas nur  
ekster ferma ĝardeno  
aprezadi vian gracion.*

*Mi ne volas nur  
sur tavolo-glacio  
esploradi vian fluadon.*

*Mi ne volas nur  
kontraŭ la ĵaluzio  
supozadi vian sent-staton.*

## **VI NE KREDAS?**

*Vi ne kredas? ne impetas?  
Tago ĉi al vi piedas —*

*En la horo de aŭroro  
Via larmo iĝos floro;*

*via vundo far de hundo,  
Doloranta ĝis la fundo,*

*Jam ne plagos, tamen flagos,  
Vin orbrile arte plakos.*

## **LUNLUMO**

*Kiel pura akv' el fonto  
vi el la arĝenta rondo  
kun favoro  
sen sonoro  
verŝas vin al nokta mondo.*

*Vi karesas kun tenero  
ĉiun vivon sur la tero.  
Post la tag' do  
via lakto*

*nutras teron por prospero.*

*Kiam svenas nokt-obskuro,  
kie estas via spuro?  
ruĝo, verdo,  
viv-konkordo,  
ĉu ne via ĉarm-figuro?*

## **AL S-RO ZENSTO<sup>2</sup>**

*Zefiro karesas la haron de prujno,  
Eposo aŭdiĝas jen kun eleganto.  
Nestoro en nia movado vi estas,  
Strebante estonton de la Esperanto.  
Tenadu junecon, kaj ĝoj' ĉe vi estu!  
Or-brilan longvivon el kor' de lernanto.*

## **REFOJE VIZITI**

— Laŭ la melodio de Tiaoxiaoling<sup>3</sup>

*Ĉarmis,  
ĉarmis  
ni nin dum ni varmis,  
vin pase' nun premas,  
koro mia tremas.  
Mastre,  
mastre  
Prenu min gast' re!*

## **TIGRO KAĜITA**

— Laŭ la melodio de Tiaoxiaoling

*Kaĝe,  
kaĝe  
muĝas ĝi sovaĝe.  
Kor' neniam pigra.  
Dignas kapo tigra.  
Grati,  
grati  
por al mont' paradi.*

1. La aŭtoro, membro de maŭnan-nacio, naskiĝis novembro de 1953 en Guilin de Guangxi. De post 1978 li publikigis en "Heroldo de Esperanto", "La Mondo", "Preludo", "Internacia Pedagogia Revuo", "Jen", "Fonto", "Penseo" kaj aliaj Esperantaj gazetoj pli ol 100 poemojn, kiujn li ĉinigiis aŭ esperantigis. Li kolektis multajn poemojn ĉinajn kaj Esperantajn, tradukis ilin inverse kaj aperigis ilin en formo de broŝuro. Krome li ankaŭ verkis artikolojn pri tradukado de Esperantaj poemoj.

2. El la unuaj literoj de la ses versoj de tiu ĉi poemo konsistas la nomo de s-ro Zensto.

3. Tiaoxiaoling estas nomo de melodio de ĉina antikva poemo.

## ESP-NOVAĴOJ

● En la 9-a de septembro la Ĉina E-Ligo okazis en Pekino ĵurnisidon memore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Hujucz, pioniro de la ĉina Esperanto-movado, kun pli ol 30 ĉeestantoj, kiuj laŭdis lian grandan kontribuon al la disvolvigo de la ĉina E-movado kaj esprimis la deziron sekvi lian ekzemplon kaj daŭre progresigi la ĉinan E-movadon. La Ĉina E-Ligo kaj la Pekina Poŝta Administracio kune faris kaj emisiis memor-koverton.



Esp-kurso en la '96 Internacia Esperanta Somera Semajno

● De la 15-a ĝis la 21-a de julio 1996 la Sciencista-Teknikista E-Asocio de la Ĉina Akademio de Sciencoj okazigis en la Pekina 101-a Mezlernejo '96 Internacian Esperantan Someran Semajnon por Geknaboj kaj Gejunuloj kaj simpozion pri kompilado de Esperantaj lernolibroj kaj didaktiko por ili.

● La 2-an de junio 1996 la Chongqing- (Ĉongĉing)-a E-Asocio, Sichuan-provinco, okazigis laborkunvenon de la jaro. La 3-an kaj la 4-an de aŭgusto la asocio okazigis someran tendumon en la arbara parko Nanwenquan en Chongqing.

● Post Lŭchuan-librejo ekfunkciis en Shenyang, Liaoning-provinco, Lŭchuan-restoracio, kies mastrino estas esperantistino f-ino Lou Lixia (Loŭ Liŝja).

● La 13-an kaj la 14-an de julio la Fujian- (Fuĝjan)-a E-Asocio okazigis sian 2-an kongreson, kiun partoprenis 79 esperantistoj. Dum la kongreso oni faris laboran raporton kaj elektis la estraron. Lin Gu estis elektita kiel nova prezidanto de la asocio.

● La 5-aj Esperantaj Tagoj de Staszow okazis inter la 22-a kaj la 26-a de majo 1996. Partoprenis

80 geesperantistoj kun gastoj el Ukrainio, Francio, Finnlando, Rumanio, Aŭstrio kaj Pollando. Paralele okazis ankaŭ AIS-sesio. (Andrzej Sochacki)



Partoprenantoj de la 5-aj Esperantaj Tagoj en Staszow

● La 5-an de junio 1996 okazis Koncerto de Elektronika-Simfonia Muziko en Templo-Eklezio de la Sankta Angelo. Ĉeestis ĉ. 100 personoj. Solisto Eduardo Vargas, konata en E-ujo kiel "solo", prezentis kanton en Esperanto.

(Eduardo Vargas Cutieprez)

● E-renkontiĝo "Verdaj amikaj tagoj" en Senta okazis la 7-an kaj la 8-an de junio 1996. La programo estis interesa por ĉiuj partoprenantoj kaj al ili ebligis tro da ĝuo. Precipe interesaj estis la ekspozicio "Batalo ĉe Senta" de konata pentristo Karolj Andruŝko kaj prelego de eminentaj esperantistoj.

(Siniŝa Veliĉkovic)



Partoprenantoj de la E-renkontiĝo "Verdaj amikaj tagoj"

● Inter la 22-a kaj la 24-a de junio okazis en la ĉefurbo Karakaso la 7-a Tutlanda Renkontiĝo de la venezuela esperantistaro. La ĉeestantoj venis ne

# Naiveco

de FENG XUEFENG\*

**M**I legis rakonton: en la 14-a jarcento iu religia reformisto de Eŭropo (mi forgesis liajn nomon kaj ŝtatancon) estis kondamnita al morto pro "herezo". Kiam li estis brulmortigota, iu avino, kiu kredis je dio, aldonis brullignon. Vidinte tion, la reformisto tuj kriis: "Aĥ! Kia naiveco!"

Mi citis la vortojn, ĉar mi subite ekmemoris mian avon kaj la rakonton, kiun li rakontis al mi: "Antaŭe estis du fratoj. En vintro ili hakis brullignon sur monto. Ekpensante pri imperiestro, kiu loĝis en ora palaco, la plijuna frato diris al la pliaga: 'Frato, imperiestro estis feliĉa, ke li hakis brullignon per ora hakilo.' Aŭdinte tion, la pliaga riproĉis la plijunan: 'Stultulo! Ĉu la imperiestro hakis brullignon? En tia malvarma tago li manĝis kuiritan taron!'" Mia avo ridadis kaj klarigis al mi: "La plijuna frato ne sciis, ke la imperiestro ne hakis brullignon, kaj la pliaga ne sciis, ke la imperiestro ne

manĝis taron. Ambaŭ estis stultaj."

Mia naiva avo pensis, ke li multe scias. Sed kiam mi demandis, kion la imperiestro manĝis, li respondis memfide: "Li manĝis rizon kaj porkaĵon, same kiel ni festenas en la Printempa Festo." Rigardu, kia naiveco! Kiam mi poste revenis hejmen de malproksima loko, mi diris al li, ke unu manĝo de riĉuloj estas ege multekosta, paro da ŝtrumpoj de riĉulino kostas kiom lia dujara greno, kaj ŝi uzis nur unufoje. Sed li ne kredis.

Tamen mi ne mokis mian avon kaj tiajn homojn kiel li. Li estis naiva kaj ankaŭ kuraĝa — antaŭ unu jaro io okazis al li: dum 60 jaroj li akumulis arbo-trunkojn unu post alia kaj jam havis pli ol 300 por konstrui domon, sed ili estis forbruligitaj. Laŭdire li dormis kiel svene 3 tagojn, poste li vekigis kaj diris: "Mi rekomencu!" Li tute forgesis, ke li jam estas 78-jara. ■

\*Fama ĉina literatura teoriisto. Li verkis tiun ĉi artikolon en 1943.



nur el ĉiuj partoj de la lando, sed ankaŭ el najbaraj Kolombio kaj nederlanda insulo Aruba. Kelkaj personoj prelegis pri Esperanto. La partoprenantoj havis ŝancon rigardi la videobendon "Mazi en Gondolando" kaj ege laŭdis tiun belan desegnofilmon. (J. E. Bachrich)

● Ekde 01 02 kaj 01 07 1996 la ĉeĥa poŝto propagandis ĉe poŝtoŝancejo Straznice, distr. Hodonin, la 81-an UK kaj uzis ĉeĥlingvan kaj E-lingvan

afrankmaŝinstampilon kun teksto "81-a Universala Kongreso de Esperanto Prago 20.-27.7.1996". Ĉe la sama poŝtoŝancejo oni uzadis porokazan Reko-glumarkon kun la sama teksto. En la kongresejo de la 81-a UK en Prago, la ĉeĥa poŝto uzadis dum tagoj 20.-27.07.1996 porokazan poŝtstampilon kun teksto: "81-a UK de Esperanto Praha 20.-27.7.1996 Praha 49". (Vladislav Hasala)



Aziaj esperantistoj kantantaj la himnon "La Espero"

WANG HANPING:

# Nova paĝo de Esp-movado en Azio

**L**A Unua Azia Kongreso de Esperanto, multe atendita de la aziaj esperantistoj, okazis antaŭ nelonge en Ŝanhajo. Tio manifestis la forton kaj unuiĝon de la aziaj esperantistoj kaj akcelos Esp-movadon en Azio.

Jam en la komenco de la nuna jarcento Esperanto enkondukiĝis en Azion. Ĉinio, Japanio kaj Koreio la unuaj fondis Esp-organizaĵojn. Tiuj landoj fariĝis pioniroj de Esp-movado en Azio. En la batalo kontraŭ koloniismo kaj por nacia sendependiĝo kaj emancipo Esperanto ludis pozitivan rolon. Tamen en la unua duono de la 20-a jc, en multaj aziaj landoj ankoraŭ ne estis Esp-movado pro politikaj kaj ekonomiaj kaŭzoj. Post 1949 Izraelo, Vjetnamio, Mongolio, Turkio, Pakistano kaj Hindio fondis E-asociacion unu post alia kaj E-asocio aperis en sudorienta-aziaj landoj en la lastaj jaroj.

Nun en pli ol 20 landoj de Azio naskiĝis landa Esp-organizaĵo kaj 7 el ili aliĝis al UEA. En Azio okazis Universala Kongreso de Esperanto kaj Internacia Junulara Kongreso de Esperanto po 3 fojoj. En

la lastaj 20 jaroj Esp-movado ricevis grandan disvolviĝon en Azio.

Tamen Esp-movado ne atingis egalan sukceson en ĉiuj aziaj landoj. Ĝi mankas ankoraŭ en iuj aziaj landoj, en aliaj aziaj landoj ĝi komencis nur siajn unuajn paŝojn kaj en triaj aziaj landoj ĝi progresas tre malrapide pro financaj problemoj, kvankam ĝi havas kompare longan historion. Esp-movado renkontis malfacilojn ankaŭ en Ĉinio, kies Esp-movado estas kompare forta. Kiamaniere oni povas solvi tiujn problemojn? Tio fariĝis ŝlosilo por Esp-movado en Azio.

Estas grave disvolvi Esperanton en Azio, kies loĝantoj konsistigas duonon de tiuj de la tuta mondo. Pro tio UEA donis grandan atenton al Esp-movado en Azio. En la pasintaj jaroj ĉiu kongreso havis apartan diskuton pri la azia Esp-movado. En la lastaj estraroj de UEA laboris membro pri azia agado kaj oni difinis projekton por disvolviĝo de Esperanto en Azio: Plifortigi kunlaboron de la aziaj landaj E-asocioj; aligi pli da aziaj esperantistoj al UEA; sendi aziajn aktivulojn al aliaj landoj por

## Deklaracio de la Unua Azia Kongreso de Esperanto

**N**I, aziaj esperantistoj, kongresante por la unua fojo inter azianoj mem, en la historia urbo Ŝanhajo, ĝoje konfirmas, ke Esperanto, la internacia lingvo, tre sukcese kaj bonege funkcias kiel la komuna interkomunikilo inter azianoj. Ni, homoj venintaj el diversaj landoj en Azio tute senprobleme kaj sendepende de iuj ajn etnaj lingvoj de potencaj landoj, disdonis la amikecon, diskutis pri la estonteco de nia regiono. Ni, dum la kongreso, sentas nin vere forte ligitaj unu kun alia en unu familio, ĉar ni uzis nur unu komunan neŭtralan lingvon tute senrilate al la ekonomiaj kaj politikaj fortoj de sialandaj nacioj.

Ni, aziaj esperantistoj de la landoj, ĉu progresintaj ĉu progresantaj, ĝoje konfirmas ankaŭ, ke Esperanto kreita kiel la paciga lingvo por la tuta homaro, funkcias ne nur kiel la ideala helpilo por pacigo kaj amikigo de homoj, sed ankaŭ kiel la scienca helpilo, per kiu oni interŝanĝas fakajn sciojn. Esperanto do estas grava socia fenomeno, al kiu devas atenti ĉiuj registaroj, instancoj kaj la homoj mem, kun bona volo kaj konscienco, ĉar ĝi vere ebligas al homoj la egalecon kaj demokratiecon trans la obstakloj kaŭzataj de la malsamo de kulturo, riĉeco kaj pensmaniero.

Do surbaze de tiaj konfirmoj, ni, partoprenantoj de la Unua Azia Kongreso, jen deklaras al la mondo:

Unue, Esperanto, kvankam kreita surbaze de hind-eŭropaj lingvoj, bonege funkcias kiel la komuna interkomunikilo ankaŭ en azia regiono, kies plejpartaj lingvoj estas en alia sistemo. Do nia movado por disvastigi la internacian komunan lingvon absolute bezonatas ĉie en la mondo trans iaj ajn geografiaj kondiĉoj, kaj ni strebos daŭrigi nian valoran movadon por realigi pli bonan, justan, demokratian mondon.

Due, pro la ideala celo de Esperanto por pacigi la tutan homaron pere de unu neŭtrala komuna lingvo, kaj ankaŭ pro la efika funkcio de Esperanto kiel la interŝanĝilo de sciencaj kaj fakaj scioj, ni alvokas al ĉiuj registaroj kaj intelektuloj montri grandan intereson kun favora kaj morala subteno.

Trie, ni, aziaj esperantistoj, konfirmante, ke la Azia Kongreso vere estis bona evento por akceli regionan movadon en Azio, kaj ke ĝi ebligis ĝui internacian kongreson egale al la homoj en progresantaj landoj en azia regiono sen granda ekonomia risko, anoncas, ke la azia kongreso daŭre okazos en aziaj landoj.

Aŭg. 25. 1996  
Ŝanhajo

studo pri nia lingvo; helpi eldonadon Esperantaj libroj.

Ankaŭ aziaj esperantistoj aktive serĉas novan vojon por la movado. En la 79-a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo, 1994, ĉinaj, japanaj kaj koreaj kongresanoj iniciatis la Komisionon pri Azia Esperanto-Movado (KAEM), kiu decidis okazigi la azian kongreson. KAEM aktive laboras kiel oficiala filio de UEA kaj eldonas la trimonatan gazeton "Esperanto en Azio". Ĝi jam prenis sur sin la taskon gvidi Esp-movadon en Azio. La azia kongreso donis al la aziaj esperantistoj ŝancon praktiki Esperanton kaj vigligi la azian Esp-movadon.

Azio estas kontinento, kie ekonomio kreskas plej rapide en la mondo. Multaj opinias, ke la 21-a jc estos jarcento de Azio. Kun ekonomia disvolviĝo certe oftigos la interŝanĝo inter aziaj landoj kaj tiu

inter Azio kaj aliaj kontinentoj. Tiam la lingva baro fariĝos pli evidenta. Tio donos bonan ŝancon por disvolviĝo de Esp-movado en Azio.


La disvolviĝo de Esp-movado en Azio bezonas ne nur penadon de KAEM, sed ankaŭ la unuiĝon kaj kunlaboron de la aziaj samideanoj. Ni scias, ke la nura penado de ni esperantistoj ne sufiĉas. Ni devas kontaktiĝi kun multaj eminentuloj, por ke ili fariĝu amikoj de nia lingvo kaj konu la pozitivan rolon de Esperanto en solvado de lingva problemo. Tiamaniere nia lingvo povos kreski kontinue kaj la realiĝo de nia idealo pli kaj pli proksimiĝos.

Ni jam malfermis novan paĝon en la historio de la azia Esp-movado. Ni esperas, ke unuiĝos ĉiuj esperantistoj kaj kune kreos la belan perspektivon de nia movado. ■

## FACETOJ DE LA KONGRESO

### UTILA DISKUTO

Posttagmeze de la 22-a de aŭgusto kunvenis en la salono Elpin respondeculoj de E-organizaĵoj en Azio. La ĉeestantoj diskutis ĉefe pri 5 projektoj por la azia E-movado. Ili



Kunsido pri azia agado

varme diskutis pri sendo de aziaj aktivuloj al disvolviĝintaj landoj por studvojaĝo. Iuj opiniis, ke leviĝo de la lingva nivelo de kelkaj homoj ne helpas disvolviĝon de la loka E-movado, ili preferis uzi la monon por pli da homoj, dum aliaj opiniis, ke la studvojaĝo utilos ne nur al homoj, kiuj vojaĝos al disvolviĝintaj landoj, sed ankaŭ al popularigo de la de ili akiritaj spertoj en sia propra lando. La diskuto ne venis al komuna decido, tamen grava estis tio, ke ili ĉiuj celis al disvolviĝo de la E-movado en sia kontinento.

(Wang Jianbing)

### MEDICINA SIMPOZIO

Inter la kongresanoj estis nemalmultaj medicinistoj, kiuj okazigis simpozion posttagmeze de la 22-a en la salono Verda Majo. La kunveno ricevis 20 disertaĵojn. La simpozia temo estis "Tradicia orienta medicino". En la simpozio prelegis ĉina, hinda kaj korea samideanoj. Ĉar ankaŭ multaj deziris fari paroladon, la difinitaj horoj ne sufiĉis kaj oni daŭrigis la diskuton en la vespero.

(Cui Zhiqin)



Malgrandaj kongresanoj

### NOVAJ FORTOJ

El la kongresanoj estis multaj gejunuloj. Posttagmeze de la 23-a okazis en la salono Lusin kunsido pri junulara movado en Azio. S-ino Shi Xueqin el Ĉinio konigis, kiel ŝi instruis Esperanton al elementlernejoj. Vicprofesoro Cui Jianhua proponis intensigi la laboron por konduki aziajn gejunulojn al la esperantistaro, ĉar ili estas nova forto, estonteco kaj espero de nia movado. Japana samideano konigis la junularan movadon en sia lando. Pakistanaj samideanoj esperis, ke junaj esperantistoj de ĉiuj aziaj landoj pli intime kunlaboros kaj faros interŝanĝon inter si.

(Wang Jianbing)

### ALIA LIGILO

Estis tre viglaj esperantistaj fervojistoj en la kongreso. Posttagmeze de la 24-a, ĉinaj, japanaj kaj germanaj fervojistoj kunsidis, parolis kaj diskutis pri siaj landaj fervojaj statoj kaj fervo-



jista E-movado. S-ro Lee Chong-Yeong, prezidanto de UEA, skribis por la kunsido: "Same kiel Esperanto fervojo estas ligilo de popoloj. En tiu senco internaciaj fervojistoj povas kontribui multe por la disvastigo de nia lingvo kaj ĝia ideo." (Han Zuwu)

### NEORDINARA DONACO

Pro trafika problemo niaj uzbekstanaj samideanoj malfruis al la solena inaŭguro. Ili estis ĝojaj ĉeesti la kongreson. En la solena fermo ili donacis bele faritajn bongustajn panojn al LKK kaj KAEM por esprimi sian dankon al ilia klopodado por la kongreso kaj azia E-movado. Sur la panoj legiĝas "Azia Kongreso Ŝanhajo 96" kaj "Vivu Esperanto KAEM". (Wang Hanping)



Donaco de uzbekstanaj esperantistoj

### HAZARDA RENKONTIĜO

Posttagmeze de la 29-a niaj samideanoj de PE2 vizitis la Someran Palacon en Pekino. Iu itala vojaĝanto venis al vjetnama esperantisto kaj petis permeson rigardi la insignon sur ties brusto. Akirinte la permeson, tiu eŭropano legis en ĝusta Esperanto: "La Unua Azia Kongreso de Esperanto". Tio mirigis ĉiujn apudstarantojn de la karavano. Ili en ĝojo konigis unu alian kaj diris ĝis revido. Post nelonge la karavano denove vidis la italon. Ili ĉiuj ekĝojis pro la refoja renkontiĝo kaj faris fotojn en gajeco. El la interparolo oni sciis, ke tiu italo estas leganto de "El Popola Ĉinio". Lia nomo estas Clerici Ranieri. (Wang Shirong)

LAŬLUM:

## Triumfu nia pacbatalo!

### — Saluto al la Unua Azia Kongreso de Esperanto

*Saluton, karaj gesamideanoj!  
Gratulon pro la Azia Kongreso!  
Ĝi, mejloŝtono de progreso,  
manifestiĝo de elano,  
brilegu per plena sukceso!*

*Starante sojle de l' nova jarcento,  
ni, pacamanta kolegaro  
por bela lingvo-idealo,  
kun forta fid' kaj devosento,  
deziras puŝi l' Esperanto-movadon  
al fina venko, kaj l' homfratojn  
konduki al interkompreno,  
por amikiĝo, kunlaboro  
per la helpo de komputoro, jeto,  
sputniko, internacia komunika reto,  
por vere nobla entrepreno  
kontraŭ polucio kaj tertremo,  
aidoso kaj kancer-tumoro,  
ke la homar' fariĝu granda familio,  
feliĉe vivu en harmonio!*

*Nun, mi alvokas al vi, karaj,  
precipe la generacio juna,  
kunagu pene solidaraj,  
por estonteco brila suna!*

*Triumfu nia idealo!  
Triumfu nia pacbatalo!*

# Pri la Unua Azia Kongreso de Esperanto

Teksto de WANG HANPING kaj WANG LIHUA  
Fotoj de LI CHUNGENG

**D**E la 22-a ĝis la 25-a de aŭgusto 1996, 584 esperantistoj el 18 landoj kaj regionoj kolektiĝis en Ŝanhajo, por la Unua Azia Kongreso de Esperanto. Ekde tiam aziaj esperantistoj havis sian propran kongreson kaj skribis novan paĝon en la proksimume 100-jaran historion de la azia E-movado.

La Hotelo Silka Vojo servis kiel la kongresejo kaj la solena inaŭguro okazis en la halo Zamenhof en la Ŝanhaja Centro de Komercaj Aferoj. Kiam s-ro Takuti Yosikazu, prezidanto de la Komisiono de UEA pri Azia E-movado (KAEM), deklaris malfermita la Unuan Azian Kongreson de Esperanto, eksplodis en la halo varma aplaŭdado. Sekvis la saluto de s-ro Ye Gongqi (Je Gongĉji), prezidanto de la Ŝanhaja Popola Kongreso kaj de la Honora Komitato de la Unua Azia Kongreso de Esperanto. Li diris, ke aziaj landoj plejparte havis malfeliĉan historion kaj aziaj popoloj bone scias la gravecon de la nacia digno, valoron de paco kaj rolon de Esperanto en la interkomunikado de diversaj nacioj. Li esperis, ke la kongreso akcelos disvolviĝon de la azia E-movado, amikecon, interŝanĝon kaj kunlaboron inter la popoloj de aziaj landoj. La kongreson salutis ankaŭ prof. Chen Yuan, honora prezidanto de la Ĉina E-Ligo kaj de la Honora Komitato de la Unua Azia



S-ro Ye Gongqi salutis la inaŭguron.



Kongresanoj



S-ro Laulum (dekstre), membro de la Akademio de Esperanto, kaj alilandaj esperantis toj

S-ro Wang Jianbing, asista ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, parolas en junulara kunsido.

S-ro Wei Yuanshu (dekstre), prezidanto de la Sanhaja Esperanto-Asocio, transdonis la kongresan flagon al respondeculo de la Vjetnama Esperanto-Asocio, gastiganto de la venonta azia kongreso.



Kongreso de Esperanto. Li retrorigardis la historion de la azia E-movado, senlacajn klopodadojn kaj luktadojn de aziaj esperantisto-pioniroj; li alvokis, ke la aziaj esperantistoj ne forgesu la historion, kaj daŭre klopodu por la bela idealo de Esperanto. Prof. Lee Chong-Yeong, prezidanto de UEA, esprimis sian varman gratulon al la Unua Azia Kongreso de Esperanto. Li laŭdis, ke la kongreso estas frukto de la daŭra klopodo de KAEM, kaj ĝoje anoncis al la tuta kongresanaro: dum la matena akcepto por honoraj gastoj s-ro Ye Gongqi konsentis esti amiko de Esperanto. Tio vekis varman aplaŭdadon de la kongresanoj.

La kongreso ricevis multajn gratulajn mesaĝojn. S-ro Bak-in, honora prezidanto de la Honora Komitato de la Unua Azia Kongreso de Esperanto, de la Ĉina E-Ligo kaj de la Ŝanhaja E-Asocio, skribis: "Esperantistoj de Ĉinio kaj la aliaj landoj de Azio kreu mano en mano la superban 21-an jarcenton."

La 20-a jarcento baldaŭ forpasos. Kia estos Azio en la estonteco? Tio estas multe parolata hodiaŭ. La kongresa temo estis "Azio kaj la 21-a jarcento". Pri tio Prof. Lee Chong-Yeong faris enkondukon. Dum 4 tagoj la kongresanoj pritraktis la temon kun la subtemoj: "Azia ekonomio kaj la 21-a jarcento", "Azia scienco, tekniko kaj la 21-a jarcento", "Azia edukado, kulturo kaj la 21-a jarcento" kaj "Azia E-movado kaj la 21-a jarcento". Oni faris ankaŭ viglan diskutadon pri azia E-movado en la kunsidoj "Azia Movado", "Junulara movado en Azio" kaj "Respondeculoj de E-organizaĵoj en Azio".

Krome medicinistoj, goomatoroj, fervojistoj, komercistoj, ekonomikistoj k.a. kunsidis kaj diskutis pri siaj fakaj agadoj. Kaj okazis ankaŭ kunsidoj de SAT-anoj, oomotanoj, "turismo pere de Esperanto", ktp. Aparte menciindas la faka kunsido pri "Seksa diskriminacio kaj



En arta vespero

virino", kiu tuŝis iujn profundajn sociajn problemojn.

La redakcio de "El Popola Ĉinio" okazigis kunsidon de EPC-legantoj. Konsidere la nunajn malfacilojn de EPC, multaj legantoj kaj perantoj prezentis siajn proponojn. Iuj eĉ surloke donacis monon al la Fondaĵo EPC-abono kaj abonis la revuon.

Dum la kongreso oni ĝuis ankaŭ la videofilmon pri la kongresa urbo "Vojaĝo tra Ŝanhajo", kie la kongresanoj mem poste ekskursis. Ŝanhajo, la plej granda urbo de Ĉinio, estas konata kiel lulilo de la azia

E-movado. Tie movadis kaj klopodis pioniroj kaj subtenantoj de Esperanto, kiaj Eroŝenko, Verda Majo, Elpin kaj Lusin. Pri ili oni faris prelegojn en kunsidoj, kiujn ĉeestis multaj kongresanoj.

La arta vespero impresis kiel agrabla mozaiko de aziaj kulturoj. Oni ja ĝuis tradiciajn dancojn, kantojn, humuraĵojn kaj aliajn programerojn prezentitajn de esperantistoj el Ĉinio, Japanio, Koreio, Vjetnamio, Francio, Uzbekstano kaj aliaj landoj kaj regionoj.

En la 25-a de aŭgusto la Unua Azia Kongreso de Esperanto fermiĝis kun granda sukceso. En la solena fermo s-ro Paramo Chong, sekretario de KAEM, faris la resumadon. Li emfazis, ke la kongreso ŝuldas sian sukceson al LKK, KAEM kaj la tuta kongresanaro. S-ino Syozi Keiko, membro de KAEM, voĉlegis la deklaracion de la Unua Azia Kongreso de Esperanto en Ŝanhajo. La kongresanoj aprobis ĝin per varma aplaŭdo. Poste, s-ro Takeuti Yosikazu proklamis: Post pluraj diskutadoj KAEM decidis, ke la dua kongreso okazos en Vjetnamio en 1999.

Reprezentanto de vjetnamaj esperantistoj esprimis sian dankon al KAEM kaj aziaj esperantistoj pro ties konfido kaj diris, ke ili faros ĉion eblan por sukcesigi la duan kongreson, esperante, ke pli da esperantistoj renkontigos en Vjetnamio 3 jarojn poste. ■



# Aŭtourbo en montvalo

Teksto de SUN AIJUN  
Fotoj de LIU SIGONG



**E**N antaŭurbo de Zunyi, sudokcidenta Ĉinio, estas loko nomata Maocaopu (signifanta lokon kun sovaĝaj herboj kreskantaj ĉie). Sed mi vidis antaŭ mi lokon nedezertan, kiu jam fariĝis unu el la novaj industriaj regionoj de la provinco Guizhou (Gujōu) — Spaca Aŭtourbo de Zunyi. En ĝia vasta subĉiela aŭtoparko mi vidis, ke centoj da belaj malpezaj aŭtoj bonorde staras en vicoj kaj pretas veturi al diversaj lokoj de Ĉinio.

La aŭta industrio de Ĉinio startis malfrue, kaj en la lando estas nur kelkaj entreprenoj kun relative granda skalo kaj alta nivelo. Tial, je mencio pri tiu aŭtourbo kaj la de ĝi fabrikitaj aŭtoj kun marko Spaco, oni sentas, ke ili eliĝis abrupte el sub la tero. Fakte tio tute ne estas stranga, ĉar la aŭtourbo antaŭ dekkelkaj jaroj estis ekstreme sekreta militindustrialia entrepreno, la bazloko de la ĉina spaca industrio en Guizhou, situanta en montvalo pli fore de la urbo Zunyi.

Komence de la 50-aj jaroj Ĉinio ĵus finis la Liberigan Militon kaj starigis novan soci-ordon. La lando tiam estis ege malforta, kaj internacie la malamikoj ĉiurimede klopodis izoli ĝin. Sinsekve okazis la Korea Milito kaj la Vjetnama Milito, kio sentigis la



ĉinojn, ke la mondo ne estas trankvila, okazos eble pli granda milito... Ĝuste sub tiu situacio la ĉina registaro kolektis grandan nombron da plej eminentaj sciencistoj kaj teknikistoj kaj grandan kvanton da ekipaĵoj kaj mono por konstrui en montvalo de landinterno strategian postfrontan industrian bazlokon kun skalo kolosa kaj fakoj kompletaj. Ĉio ĉi celis kompreneble defendi la landon kaj la popolon kontraŭ ŝajne tuj eksplodonta milito.

Tamen en la 70-aj jaroj okazis grandega ŝanĝiĝo en la monda situacio. La primara problemo vaste atentata de diverslandaj popoloj travivintaj militajn suferojn estas defendi pacon kaj disvolvi ekonomion. Kvankam daŭre ekzistis la danĝero de milito, tamen la kresko de la paca forto superis tiun de la milita forto. La ĉina popolo ĉiam klopodis por mondopaco, ĝi kompreneble deziregis kapti la ŝancon de paca evoluo koncentri siajn fortojn homajn, materiajn kaj financajn por laŭplane fari ekonomian konstruadon, altigi la nivelon de la popola vivo kaj efektiviĝi la modernigon de la lando.

Kiamaniere turni militindustrialian entreprenon en la civilan, tio ja estas tasko elmetita sub la nova internacia politika situacio. Precipe de post 1979 Ĉinio reduk-

tis sian armeon je miliono da personoj kaj malmultigis monon por la nacidefenda konstruado, draste malleviĝis la mendo de militaj produktoj kaj lamis multaj militindustriaj entreprenoj. Turni militindustrialian entreprenon en la civilan estas bezono ne nur de la situacio, sed ankaŭ de la ekzistado kaj disvolviĝado de multaj militindustriaj entreprenoj mem. Fakte ekde tiam la civila produktado de la ĉinaj militindustriaj entreprenoj kreskis ĉiujare je pli ol 20%. Ekde 1986 oni faris vastan teknikan renovigon. Ekzemple, en aeronautika industria bazloko oni faris produktan linion de kompresoro de klimatizilo, en armilindustrialia bazloko produktis landfaman motorciklon, kaj iuj militindustriaj bazlokoj fariĝis produktoj de rara tero. Ĝuste en tiu situacio ekfunkciis la produktala linio de malpezaj pasaĝer- kaj ŝargaŭtoj en la spaca industria bazloko de Guizhou.

Fakte la civila produktado en la bazloko de Guizhou startis en 1979. La bazloko disvolvis pli ol 400 civilajn produktojn, kiaj fridujo, ricevstacio de satelita televido kaj eĉ kupra tabloforneto kutime uzata de sudokcidentanoj. Same kiel ĉiuj aliaj militindustriaj entreprenoj, la malnova produktala tasko de la bazloko de Guizhou estis unuece difinita de





En veldejo



Transportotaj aŭtoj



En muntejo

la ŝtato kaj la produktoj estis unuece distribuitaj de la ŝtato, tial kiam la bazloko estis puŝita al la merkato kaj devis mem serĉi klientojn, ĝi vere ne sciis kion fari. Nur en 1985 ĝi decidis fabriki aŭtojn.

De post 1985 oni mobilizis en la bazloko fortojn de 18 fabrikoj kaj 2 esploraj institutoj kaj post tri-jara penado fabrikis malpezan ŝarĝaŭton, malgrandan pasaĝeraŭton kaj aliajn aŭtojn. S-ro Yuan Changhua diplomiĝis el universitato en 1970 kaj venis de Pekino al tiu montvalo. Li laboris jam 26 jarojn kaj fariĝis el ordinara teknikisto estrarano de sia entrepreno. Kiam li akompanis min viziti la ĝeneralan muntejon, li palpis aŭton ĵus elirintan de la produkta linio, dirante: "La muldiloj de ĉiuj aŭtopecoj estas projektitaj kaj faritaj de ni mem. Niaj aŭtoj estas ne nur belaj kaj

bonkvalitaj, sed ankaŭ nemultekostaj. En junio ĉi-jare, tuj veninte en la merkaton, niaj aŭtoj ricevis ŝaton de klientoj kaj mendantoj."

Por ke la aŭtoj kun marko Spaco atingu pli altan nivelon kaj havu pli grandan produktan skalon, dekoj da militindustriaj entreprenoj en la bazloko transformiĝis en la Ĉinan Sudan Spacan Grupon, kiu per investitaj pli ol 1.2 miliardoj da juanoj konstruis la nunan modernan aŭtourbon. Ili kredas, ke la de ili produktitaj aŭtoj certe okupos lokon en la ĉina aŭta merkato. Nun ili jam konstruis produktan kvartalon kun areo de 70 000 kvadrataj metroj, starigis kompletajn produktajn liniojn de formigo de aŭtoŝelo, pregado, veldado, lakado, interna ornamado, muntado kaj kontrolado kaj atingis jaran produktan povon de pli ol 50 000

malpezaj aŭtoj. En la loĝkvartalo de la aŭtourbo loĝdomoj de laboristoj kaj oficistoj staras en vicoj, funkcias jam legomvendejo, magazeno kaj aliaj servejoj. Troviĝas tie ankaŭ spac-industria lernejo, mezlernejo kaj elementaj lernejoj.

Kiam mi devis forlasi la aŭtourbon, mi ankoraŭ ne sciis klare, kion produktis antaŭe la tieaj militindustriaj fabrikoj. Laŭ la nomo eble io fluganta en la ĉielo. Tamen ĉio ĉi jam estas tute ne grava. Mi pensas nur, kiun rilaton ĝi havas kun aŭto. Eble io fluga en la ĉielo, eble io kura sur la tero bezonas movforton. Kio do estas tiu movforto? Evidente ne estas sole motoro aŭ brulaĵo, certe io alia. Mi pensas, ke tio certe estas deziro pri paco. Ĝuste kun tiu deziro la spaca bazloko fariĝis aŭtourbo. Mi kredas, ke kun tiu sama deziro la aŭtoj kun marko Spaco certe povos senĉese veturi el la montvalo al la mondo. ■

## '97-KONKURSO DE FOTOJ DE E-ISTOJ

Dank' al fervora subteno de niaj legantoj la rubriko "Fotoj Faritaj de E-istoj" pliriĉigis la enhavon de nia revuo. Ĉi tie ni kore dankas la kontribuintojn. Nemalmultaj legantoj interesiĝas pri la rubriko kaj esperas, ke ni ĝin daŭrigos, por ke e-istoj-fotoamatoroj faru interŝanĝojn. Pro tio ni okazigos en 1997 konkurson de fotoj faritaj de e-istoj kaj esperas, ke pli da e-istoj partoprenos en ĝi. Sendu al ni fotojn antaŭ la 31-a de aŭgusto 1997 (fotoj atingintaj post la dato partoprenos en la dua konkurso) kaj ili sinsekve aperos sub la rubriko "Fotoj Faritaj de E-istoj".

I. Prijuĝado kaj premiado:

Niaj redaktoroj kaj ĉinaj fotistoj invititaj de la redakcio prijuĝos ĉiujn fotojn aperintajn sub la menciita rubriko kaj donos al plej bonaj el ili la unua-, dua- kaj triagradajn premiojn.

II. Detaloj pri la konkurso:

Bonvenaj estas fotoj faritaj de e-istoj pri naturaj pejzaĝoj, vidindaĵoj, naciaj moroj kaj kutimoj. Bonvolu sendi al ni kolorajn fotojn

sur glacea papero kun grandeco almenaŭ de 126 x 86 mm aŭ kolorajn diapozitivojn, kaj koncizan klarigon por ĉiu foto. La nombro de la fotoj estas nelimigita. Skribu: por "Fotoj Faritaj de E-istoj", la nomon, adreson kaj landon de la aŭtoro preslitere.

III. Premioj:

Ni aperigos la nomon de la premiitoj en la decembra numero de 1997. La premiitoj ricevos de la redakcio la revuon de EPĈ n-roj 1-12 de 1998 kaj Esperantan libron: "Ĉina Enciklopedieto" por la unuagrada premio, "5 000 Jaroj de Ĉinio" por la duagrada kaj "Provu por Via Sano" por la triagrada.

La rubriko "Fotoj Faritaj de E-istoj" servas al ĉiuj e-istoj. Ni esperas, ke ĝi plaĉos al pli da legantoj. Laŭ la nombro de fotoj atingintaj la redakcion ni okazigos neregule tian konkurson, esperante, ke vi, niaj karaj legantoj, prezentos al ni proponojn kaj rimarkigojn por plibonigi la rubrikon.

La Red.



# La naturo kaj homoj sub la suno

de PANG NAIYING



Prof. Sun Weimin

**E**N ordinara ateliero lokiĝas desegna tabulo. La olepentraĵo sur la tabulo figuras kampon, knabinon kaj hundon sub la brila suno.

La pentraĵo estas farita de prof. Sun Weimin, vicrektoro de la Centra Belarta Instituto kaj dekanato de ĝia fakultato de olepentraĵoj. Liaj pentraĵoj bele prezentas la harmonion inter la homoj kaj la naturo per lumoj kaj koloroj. Preskaŭ ĉiuj liaj pentraĵoj temas pri leŭso de norda Ĉinio kaj kamparanoj vivantaj sur ĝi: Maljunulo kun kaloplenaj manoj; knabino kun vangoj ruĝiĝintaj de vento; kaduka tera muro; neĝkovrita tero kun sulkoj; aminda azeneto...

Sun Weimin estas kvietista pentristo. Eble pro lia kvieteco, tre maloftas troigitaj linioj aŭ distorditaj figuroj en liaj pentraĵoj. Li lertas enpensigi la apertecojn pri la temo per subtila detalaĵo.

La pentraĵo "Siesto" bele bildigas kvietecon en kamparana korto sub la suno. En la korto kuŝas sunumata bovo kiel la unika vivulo. Tamen ĉio en la korto imagebligas tiujn, kiuj laboras tutjare: rikoltitaj maizspikoj sekigataj sub lignaj kradoj; fera forko staranta ĉe muro kaj ventumkorbo lokita surloke. Nun la laborantoj siestas. Kion do ili faros posttagmeze...

Laŭ Sun Weimin, la kamparana vivo, ŝajne simpla, primitiva kaj lantaritma, havas pli profundan humanecon ol en la urboj. La pentraĵo "En la dekdua monato" prezentas la scenon, ke ĉe la jarfino mezaĝulo pretas konduki al foiro sian azenon kun legomoj surdorse kaj vendi ilin por aĉeti vivbezonaĵojn por la Printempa Festo. Tiumomente, portante sian nepon sur la nuko, la avo estas alparolanta sian filon, kaj ĉi tiu karesas tamen sian filon...

S-ro Sun Weimin atribuis sian profundan konon pri la kamparana vivo al sia 3-jara terkulturado sur leŭsa tero post 1969. En tiu tempo li multe skizis kaj metis solidan bazon al sia arto. Nun, kiam li eksidis por fari pentraĵon, venis tuj el lia memoro unu post alia scenoj de la kamparana vivo, kiun li spertis siatempe.

En la 9-a jardeko li prezentas la aspiron de urbanoj al la naturo per moderna ole-pikturo kaj esprimas siajn sentojn al la vivo per lumoj kaj koloroj, dum en la 8-a jardeko li figuris la naturon kaj homojn en kamparo per la tradicia ole-pikturo.

Lia pentraĵ-serio "En freŝa verdeco" temas pri patrino kaj filino en la suno kaj inter arboj. Ĝi estas multe atentata de la ĉina belarta rondo. Nemalmultaj sekvas lian ekzemplon. Oni nomas ilin "sunluma skolo". Prof. Sun esperas, ke la pentraĵ-serio sentigos la mondon plenan de sunlumo kaj apartan ĝojon en la naturo. Li esperas ankaŭ havigi amon al la vivo kaj naturo per vigleplenaj personoj, bestoj, arboj kaj eĉ verdaj folioj en siaj verkoj. La pentraĵoj "En somera mateno", "Arbaro en septembro", "Ora sezono" kaj tiu, kiun mi menciis komence de tiu ĉi teksto, portas pli da lirismaj kaj poeziaj koloroj ol liaj antaŭaj verkoj.

En 1990 Sun Weimin vizitis pli ol 20 urbojn de Eŭropo, inkl. de la hejmloko de olepentraĵoj. Li estis kortuŝita de plena perfektigo de kolorigo en majstraj verkoj. Li konsciis, ke sen koloro ne estas ĉarmo de olepentraĵoj kaj sen lumo ne estas koloroj, kaj ke lumo rolas kiel sango de olepentraĵo. Reveninte al la patrolando, li pli taksis la rolon de lumo kaj koloro, ke ili estu pli ĉarmaj en liaj pentraĵoj. ■



# INDEKSO DE EPĈ 1996

Nr.pĝ.

Nr.pĝ.

## POLITIKO

Grandaj atingoj en batalo kontraŭ koruptiĝo	3.24
Kiel statas la homaj rajtoj en Ĉinio?	5.4
Batalo kontraŭ pornografia veneno	6.40
Ĉinio: Magneta temo	7.4

## EKONOMIO

Komputeroj en Ĉinio	2.4
Nova fizionomio de Beihai	3.38
Alilanda entrepreno en Ĉinio	5.42
Florkulturisto Li Hongru	6.18
Trajno ekveturis el la Pekina Okcidenta Stacidomo	6.21
Tangshan restariĝis	7.50
En ĝardeno de kaŭĉukaj arboj	9.44
Vizito al maizlando	10.17
Vizito al Diaocha-lago	10.21
Aŭtourbo en montvalo	12.21
Fabriki ilmaŝinojn per komputero	12.48
Vizito al kafo-plantejo	12.28
EKONOMIE	
Leĝoj pri bankoj de Ĉinio	1.5
Ĉinio malaltigis import-tarifojn je 30%	4.15
Naŭa Kvin-jara Plano de Ĉinio	7.7

## KULTURO, EDUKO, SCIENCO KAJ TEKNIKO

Por savi la Klinitan Turon de Pizo	2.8
Kampanoj profitas de sciencoj kaj teknikoj	3.16
Ekspluato de biologiaj riĉfontoj en Yunnan	3.44
Infanoj en lernado de pekina opero	4.20
Tetrinkejoj en Hangzhou	4.41
Plenan amon al la filo	5.40
Antikva ĉina muzikaĵo retrovita en Japanio	5.49
Dum la tagoj en Arkto	6.38
Insektoj — manĝaĵoj en la estonteco	6.42
Blanknaĝila delfeno — trezoro de Ĉinio	7.36
Antikva urbeto Zhongxiang	7.40
Longa vojo por la ĉina kosmonaŭtika afero	8.17
Daŭre lernu malriĉaj urbaj geknaboj	8.20
Fotografio en la Imperiestra Palaco	8.40
Verdaj manĝaĵoj en Ĉinio	10.36

Por la informa ekspresa vojo de Ĉinio	10.40
En dormoĉambro de studentinoj	10.42

## ĈINA KULTURO

1996 — la jaro de muso	1.38
Idiomoj en la ĉina lingvo	3.36
Vizaĝornamoj de antikvaj ĉinaj virinoj	5.44
Media protektado en la antikva Ĉinio	7.38
Fremdaj influoj en la ĉina lingvo	9.38
Naskiĝloko de antikvaj raketoj	11.48

## SPORTO KAJ HIGIENO

Organa grefto en Ĉinio	1.43
Elstara urokirurgo Wu Jieping	1.44
La Ĉina Naĝista Teamo sin preparas por Atlanta	2.6
Nova politiko pri naskolimigo de Ĉinio	4.4
Prognozo pri ĉinaj sportistoj en Atlanta	5.6
Revenigu kriplulojn al la vivo	5.36
Xie Jun, eksreĝino de monda virina ŝakludo	7.16
Por la sano de naskipovaj virinoj	8.43
La higiena urbo Haimen	8.49
Iom pri sengrasigo	9.40
Aboco de vejĉi-ludo	9.48
Ponto al resaniĝo	11.40
La infanoj retrovu siajn sensojn	12.36
POR VIA SANO	
Masaĝo en la ĉiutaga vivo (IX)	2.48
Masaĝo en la ĉiutaga vivo (X)	4.48
Masaĝo en la ĉiutaga vivo (XI)	6.48
Gimnastiko por la gastroentera funkcio	8.42
Sengrasiga gimnastiko	10.46
Por mallaciĝo	12.44

## LITERATURO KAJ ARTO

La patro kaj birdoj (Novelo)	3.48
Humuro de Afanti	4.49
Felo inkrustita per perlaĵ larmoj (Popolrakonto)	6.43
Prezentado sur subportilo	7.25
Altas la monto longas la vojo; Amego al la vivo (Poemoj)	9.17
Landa Esperanto-biblioteko fondita en Ĉinio	9.20
Fraŭlino Jiaona (Novelo)	10.47
Festo de fiŝistoj	11.43

<b>NUNTEMPA BELARTO</b>	
Strebado de pentristo Huang Anren	2.21
Skulptistino Zhang Dedi	4.25
Koloraj "Rebusoj"	6.25
Elvokivaj pentraĵoj pri neĝkovrita lando	8.25
Lignogravuristo Zhou Yunxian	10.25
La naturo kaj homoj sub la suno	12.25

## SOCIA VIVO

Universitato por maljunuloj	1.40
Ŝipista familio sur Huaihe-rivero	1.49
En vilaĝo de rakontistoj	2.24
Amikeco	2.28
Mezlerneĵanoj en someraj ferioj	2.44
Kial ili longe vivas?	4.45
En la geknaba palaco	6.4
Balotado de kamparanoj pri vilaĝestreco	9.36
Kvadrata korto kaj kuirforno	10.41
Helpi geknabojn en ilia adoleskanteo	11.4
Neordinara familio	11.24
Komforto en strateto	12.45

## FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO

Pri advokateco de Ĉinio	2.40
Kiel pasigi semajnfinojn?	5.24
La Publika Lego-Asocio de Pekino	8.38
Por la sekureco de la popolo	11.44

## MIA VIVO

Senbrakulo kapabla je pentrado	1.42
Mi laboras kiel liftistino	4.24
Kiel mi laboras en zoo?	7.24
Mia franco-edzino	10.28

## VIRINOJ KAJ INFANOJ

Tago de ĉinaj virinoj	3.40
"Patrino de la ĉinaj provtubaj beboj"	6.46
Tri virinoj en poluso	9.24

## NACIOJ KAJ RELIGIOJ

En la loko fore de la sekulara mondo	2.36
Serĉado de metempsikoziĝinto de Banĉen Erdini la 10-a	4.16
Tri bovloj da vino de tu-oj	7.48
Estro de subprovinco	9.9
Tibetaj moroj	9.42
Kiom da infanoj en tibeta familio?	12.49

## MULTNACIA ĈINIO

Nyingchi sur la monda tegmento	2.38
En malriĉa loko de Gansu	4.35

Nacio de transloĝigo	6.35
Poŝto kaj telekomuniko en la nacimalplimultaj regionoj	8.36
Diversaj naciaj festoj en Ĉinio	10.38
Sinapogaj nacimalplimultaj virinoj	12.42

## VOJAĜO KAJ VIDINDAJ LOKOJ

Tibeto, plej proksima al la suno	1.6
Turismo kaj feriado	1.28
Xinĵiang en rapida disvolviĝo	2.16
Mistera Lugu-lago	2.49
Impresoj pri suda Henan-provinco	4.37
Fabela loko Guilin	4.39
Grimpado sur Wuling-monton	4.44
Vojaĝo en Xinĵiang	6.37
Turismo ne plu estas revo	7.44
Akva urbo sur altebenaĵo	8.35
Interesplena Nanwan-lago	8.16
Distingiĝa Lijing-hotelo en Qingdao	11.9
Mia dektaga vojaĝo en Guangxi (I)	11.36
Mia dektaga vojaĝo en Guangxi (II)	12.38

## LAŬ LA SILKA VOJO

Eterne ĉarmas la Silka Vojo	1.32
Xi'an, la komenco de la Silka Vojo	2.29
Gvardio sur la Silka Vojo	3.29
Budhismaj historioj ĉe la Silka Vojo	4.28
Xi'an hodiaŭ	5.29
Vojaĝo al Maiji-monto	6.28
Vojaĝo en Tianshui	7.29
La grava urbo Lanzhou	8.28
Profundaj sentoj al la Silka Vojo	9.29
Nacio alveninta laŭ la Silka Vojo	10.29
Por transiri la Flavan Riveron	11.29
Antaŭ transiro de Wushaoling-monto	12.29

## HISTORIAJ RESTAĴOJ KAJ ARKEOLOGIO

La Historia Muzeo de Shaanxi	1.36
Sankta loko de la ĉinaj prapatroj	3.20
Suna fajrilo antaŭ 3 000 jaroj	5.48
Spuroj de malaperinta tribo	8.24

## INTERNACIAJ AFEROJ KAJ AMIKAJ KONTAKTOJ

La mondo pri loĝantaro	1.24
------------------------	------

# ABONTARIFO DE EPĈ POR 1997

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Totalo
Aŭstralio	AUD	19,00	16,00	35,00
Aŭstrio	ATS	192,00	128,00	320,00
Belgio	BEF	575,00	375,00	950,00
Britio	GBP	10,00	6,00	16,00
Germanio	DEM	28,00	18,00	46,00
Finnlando	FIM	61,00	50,00	111,00
Francio	FRF	88,00	62,00	150,00
Israelo	USD	14,00	12,00	26,00
Italio	ITL	20200,00	13800,00	34000,00
Japanio	JPY	1700,00	1300,00	3000,00
Kanado	CAD	17,00	15,00	32,00
Nederlando	NLG	28,00	23,00	51,00
Nov-Zelando	NZD	26,00	22,00	48,00
Svisio	CHF	23,00	17,00	40,00
Usono	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO A	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO B	USD			15,00
TARIFO C	USD			10,00
<b>TARIFO A:</b> Ĉiuj landoj en Eŭropo escepte de tiuj menciitaj en la kategorio TARIFO C.				
<b>TARIFO B:</b> Korea Respubliko, Singapuro, Hongkong, Turkio, Meksikio kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko.				
<b>TARIFO C:</b> Ĉiuj landoj de Orienta Eŭropo (inkluzive de Estonio, Latvio, Litovio, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj eks-Jugoslavio) kaj ĉiuj ceteraj landoj en Azio kaj Afriko ne menciitaj supre.				
<b>Rim.</b> Por aerpoŝta sendo bonvolu aldoni 10,00 usonajn dolarojn.				

## ABONILO DE *EL POPOLA ĈINIO*

Mi sendas la abonpagon de \_\_\_\_\_ por la jaro(j) 19 \_\_\_\_\_, per  monbiletoj  internaciaj respondkuponoj  mia uea-konto.

(bv. signi per kruco en la koncerna kvadrateto.)

Familia nomo: S-ro/S-ino \_\_\_\_\_ Via epĉ-kodo: \_\_\_\_\_

Persona(j) nomo(j) \_\_\_\_\_

Adreso: \_\_\_\_\_

Lando: \_\_\_\_\_ Tel: \_\_\_\_\_

Profesio: \_\_\_\_\_ Naskiĝdato: \_\_\_\_\_

THE UNIVERSITY OF  
MICHIGAN LIBRARY  
ANN ARBOR, MICHIGAN  
48106-1000

Amo al Ĉinio	3.42
La tero avertas...	6.17
Blonda virino adeptigita en Ĉinio	11.28

## ESPERANTO

Paco, eterna temo de esperantistoj	1.16
Campinasaj esperantistoj aktivas	1.8
Vortenigmo	2.20
Katalunaj homkasteloj	3.15
Ŝanhajo, urbo de la Unua Azia	
Kongreso de Esperanto	4.42
Intervjuo kun Mark Fettes, ĝenerala sekretario de UEA	4.12
Intervjuo kun prof. d-ro Lee Chong-Yeong, nova prezidanto de UEA	5.8
Mi konis la landon de mia patro	5.17
Prago bonvenigas vin	6.7
Bonvenon al EPĈ-kunsido dum la 81-a UK	6.14
Pri la transskribo de ĉinaj personaj kaj lokaj nomoj	6.49
Mia vojaĝo en Koreio	7.12
Karmemore al Veselin Damjanov, kantisto en Esperantujo	8.10
Hujucz: Giganto de la epoko	9.4
Senlaca semanto de Esperanto	9.12
Kongreso perspektiva	11.17
Nova paĝo de Esp-movado en Azio	12.14
Pri la Unua Azia Kongreso de Esperanto	12.18
Facetoj de la kongreso	12.16
Esperanto daŭre subtenata en Ĉinio	12.5
Deklaracio de la Unua Azia Kongreso de Esperanto	12.15
Pola kongreso altiris min	12.6
En intima Esperantujo	12.7
Triumfu nia pacbatalo (Poemo)	12.17
<b>VOĈO DE E-ISTOJ</b>	
Junularo kaj tradicia kulturo	1.10
Lastaj inkunabloj serĉataj	1.11
Respondi — respondi	3.12
Numeraloj — pripensinda simpligo	3.12
Vojaĝo al Interna Mongolio	5.14
Esprimo de pasivo	7.8
Instruado de la ĉina komuna parollingvo surbaze de Esperanto	9.16
Provaĵo pri poezio	11.14
<b>ĈINAJ E-ISTOJ</b>	
Aktivulo de Esperantujo	1.13
Mao Zifu, Esperanta poeto sur rulseĝo	2.9

Zeng Hojaŭ, prezidanto de la Pekina E-Asocio	3.8
Fidela e-isto Jiang Zuyue	4.9
Chen Demin kaj la Fuzhou-a E-Lernejo	5.10
Esperanta Kamelo Li Ren	6.8
Klarneto kaj Esperanto	7.9
Respektinda Li Naixi	8.6
Hu Guozhu en Esperantujo	10.8
Antaŭiranto de la Esp-movado de Liuzhou	11.11
Vadanto en E-poezia ĝardeno	12.8
<b>ORIGINALE VERKITAJ</b>	
Dezertulo	2.11
Ŝajna vojo; Songo; Vizio (Prozaĵoj)	4.6
Puno; Kiam; Letero al ĉinaj gesamideanoj; Falas neĝretoj	6.12
Malfrua feliĉo (Novelo)	8.12
Surĉevale en edzecon; Konfeso	10.12
Poemoj	12.10
<b>POR KOMENCANTOJ</b>	
Mia kateto	1.12
Meznokta sonorado	2.15
Viziti foiron	3.14
Steloj	4.8
Papilio kaj gruo	5.20
Testudo	6.16
Azeno en leona felo (Fablo); Lupo kaj ŝafidoj (Fablo)	7.15
Zorgema filo; Abeloj kaj muŝo	8.11
Hirundoj kaj paseroj	9.15
Mia humura edzo	10.7
Frato kaj fratino	11.16
Naiveco	12.13
<b>SUR NIA LIBROBRETO</b>	
Ĉinio detale	5.28
Puzlero, plezuro, perlujo	7.42
Pompo el la ĉina kulturo	8.44
Sorĉa panoramo de la socia vivo	10.24
Pri "222 Simplaj Versaĵoj por Komencantoj"	11.38
<b>ESP-NOVAĴOJ</b>	1-12

## ALIAJ ASPEKTOJ

Novjara saluto	1.4
ĈEL — 45-jara	3.6
Nestoj de birdoj	8.48
Lulilo de nordorient-ĉinia tigo	10.4
Grandan respekton al d-ro André Albault	10.6
<b>EN ĈINAJ URBETOJ</b>	
Incensfumo kaj kuirfumo	1.20
En urbeto de pomoj	3.21

	Nr.pĝ.
Urbeto sur altebenaĵo	5.21
En ŝtona urbeto	7.21
Antikva urbeto Shendu	9.21
En la urbeto de Maotai-vino	11.21
<b>TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ</b>	
Konfuceanismo en la vivo de ordinaraj ĉinoj	2.42
Ĉu la vivo de malriĉaj urbanoj garantiata?	3.4
Ĉinaj laboruloj transmari	5.38
Pri la origino de la Hongkong-a problemo	8.4
Hongkong iras al 1997	9.10
La ĉinaj ideogramoj en komputado	10.16
Geedzeco inter ĉinoj kaj alilandanoj	11.7
Raporto el incendiita arbaro	12.2
<b>EL ĈINAJ GAZETOJ</b>	1-12
<b>INTER NI</b>	1-12
<b>KURANTAJ AFEROJ</b>	1-12

## SUR LA KOVRILO

Tibetaj knabinoj	1
Dancistino	2
Terakotaj militistoj en la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio	3
Knabineto kaj floroj	4
Gaja dancado de daur-oj	5
En infangardeno	6
Patrino kaj filino	7
Plektistino	8
S-ro Hujucz, pioniro de la ĉina E-movado	9
En vilaĝa korto	10
Ĉinaj mezlernejaninoj	11
S-ro Lee Chong-Yeong, prezidanto de UEA, s-ro Takeuti Yosikazu, prezidanto de KAEM, kaj s-ino Tan Xiuzhu, vicĉefredaktorino de EPC, en la Unua Azia Kongreso de Esperanto	12

## BILDOSERIOJ

Neĝo en printempo	1.2
Konvolvulo	2.2
Ĉe la sunsubiro	3.2
Nutrado	4.2
Turo de imperiestra palaco en mateno	5.2
Banjano	6.2
Flugado	7.2
Reveno	8.2
Ĉe sunsubiro	9.2

	Nr.pĝ.
Reveno de paŝtado	10.2
Herbo	11.2
Kato sub ĉapelo	12.2
Somerumejo Mogan-monto	2.26
Ŝanĝiĝo de Qiaodang-vilaĝo	3.18
Kuracejoj tra Tibeto	4.18
En jaŭ-a vilaĝo	5.18
En la kamparo de Haimen	8.22
Ĉinaj emeritoj	9.18
Ekranaro kun pentraĵoj pri la Ruĝdoma Sonĝo	10.22
<b>GALERIO</b>	
Bronza artaĵo	1.50
Pentraĵo "Ĉe Bianhe-rivero en la Festo de Klara kaj Helo"	2.50
Koloraj fajencaj amuzistoj	3.50
Kantado kun piedbato	4.50
Jada drako	5.50
Pentraĵo "Ĉevaloj"	6.50
Argenta kruĉo kun dancanta ĉevalo	7.50
Aglo sur cipreso	8.50
Porcelana botelo de Yuan-dinastio "Umefloroj kaj Cignoj"	10.50
Krono el oraj fadenoj	11.50
Orkideo kaj bambuoj	12.50
<b>ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ</b>	
Duan-festo de ŝuj-oj	1.26
Edzigo de jaŭ-nacio	3.26
Baj-a Tago de Rizid-priklado	5.26
Nacio de fiŝkaptado	7.26
Gaja danco de kamparanoj	9.26
Sanduo-festo de naŝi-oj	11.26

## SUR LA DORSKOVRILO


La Riverrigarda Kiosko sur Lushan-monto	1.52
En frosta vintro	2.52
Terakotaj militistoj en la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio	3.52
Tianchi-lago en Xinjiang	4.52
Printempo; Aŭtuno	5.52
La Granda Muro en nokto	6.52
Pagodo ĉe lago	8.52
Pitoreskejo Jiuzhaigou	9.52
Itala metal-skulptisto kaj e-isto	
Marto Converto en kreado;	
S-ano Marto Converto kaj liaj verkoj	10.52
Monto en nebulo	11.52
Antikva templo en aŭtuno	12.52





1. "Norda knabino"
2. "Montanino"
3. "En verdejo"
4. "Siesto"
5. "Malantaŭ ligna barilo"

1	3	
2	4	5



# Vizito al kafo-plantejo



**Ĉ**INOJ preferas teon. Ĉiu ĉino povas eldiri specojn kaj produktojn de teo. Tamen pri kafo oni scias malmulte. En la ĉina merkato vendiĝas ĝenerale kafo importita. Fakte Ĉinio havas siajn kafo-plantejojn. La malgrandgrajna kafo produktita en Yunnan-provinco estas bonkvalita.

Dum mia vojaĝo en Yunnan antaŭ nelonge, mi speciale vizitis la kafo-plantejon de Lujiang-farmejo en malgranda baseno, kiun trafluas Nujiang-rivero kaj brakumas montaroj. Pro la topografio tie estas alta temperaturo, kiu taŭgas por kreskado de kafarboj. Ambaŭflanke de Nujiang-rivero kreskas densaj kafarboj 2-3-metre altaj, kun segident-formaj folioj kaj pizo-similaj beroj verdaj. Iuj laborantoj estis akvumantaj arbojn kaj sarkantaj la plantejon. La aliaj estis suraŭtigantaj arbojn por vendi ilin en aliaj lokoj de suda Ĉinio, kie la klimato konvenas al kafarboj. Ili diris al mi, ke kiam venas aŭtuno, la plantejo plenas de arboj kun ruĝaj kafoberoj.

En la plantejo troviĝas 1 040 hektaroj da rapidkreskaj kaj altproduktaj kafarboj. Unu jaron post la plantado la arboj donas fruktojn, kaj en la sekvanta jaro la hektara produktokvanto de kafo atingas 3 000-5 250 kilogramojn. Ĝenerale ĉiu arbo fruktas 30 jarojn. En tiu plantejo neniam aperis rusto, facile akirebla por kafarboj. En 1988 vicĉefdirektoro de la Kaf-kompanio Nestle vizitis Lujiang-farmejon kaj laŭdis, ke la trinkaĵo prepar-

ita el tie produktita kafo estas bongusta kaj la kafo estas unu el la plej bonkvalitaj en la mondo.

Laborantoj de la farmejo multe profitis el la laŭkontrakta kulturado de kafarboj. Mi iris en korton de iu familio. La mezaĝa mastrino varme bonvenigis min kaj regalis min per teo. Ŝi nomiĝas Guo, kaj ŝia familio havas 4 membrojn: la geedzoj kaj gefiloj. “Ĉu vi kulturas kafarbojn?” mi demandis ŝin. “Jes, ni laŭkontrakte kulturas 0.8 hektaron da kafarboj.” “Ankaŭ aliajn?” “Krom kafarboj ni kulturas ankaŭ fruktarbojn.” Ŝi montris al mi najbaran korton kun ĉ. 300 mangarboj, liĉiarboj kaj bananarboj. Mi demandis ŝin: “Kiom da mono vi enspezas en unu jaro?” Ŝi respondis: “Sole la kafo enspezigis al ni pli ol 60 000 juanojn en la pasinta jaro. Subtrahinte 7 000 juanojn por kontrakta pago, imposta pago kaj produktokosto, ni ricevis la restan monsumon.” Ŝi diris al mi, ke la laborantoj de la farmejo enspezis ĉefe el kafoplantado. Nemalmultaj familioj aĉetis senŝeligilon por prilabori kafon. Plimultiĝis la enspezo. Ĉiuj familioj konstruis novajn loĝdomojn kaj aĉetis diversajn elektrajn aparatojn.

Post reveno al Kunming, ĉefurbo de Yunnan, mi vizitis nove konstruitan kafo-prilaborejon, kiu estas moderna kun importitaj ekipaĵoj. Ĝi prilaboras kafon nur de Yunnan, kun jara prilaborita kvanto de 2 000 tunoj. Tio montras, ke Yunnan estas produkto ne nur de kafograjnoj, sed ankaŭ de kafo-trinkaĵo. ■

# Antaŭ transiro de Wushaoling-monto

Teksto de PANG NAIYING  
Fotoj de HAN HONG

**T**RANSIRINTE la Flavan Riveron, ni daŭrigis nian vojaĝon okcidenten. Post nelonge aperis antaŭ ni la monto Wushaoling, 3 561 m super la marnivelo, nepra irejo al la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero. Ni povus facile transiri la monton aŭte aŭ trajne, tamen ni haltigis nin...

## ALLOGO FAR RUĜAJ ROZOJ

Sur la frosta kaj seka Leŭsa Altebenaĵo videblas preskaŭ neniun verdaĵon, tamen tie en Kushui prosperas ruĝaj rozoj. Ĝi estas fama produktejo de rozoj kaj roz-oleo de Ĉinio.

Kushui situas en la gubernio Yongdeng, nordokcidente de Lanzhou. Historie ĝi estis malgranda postiljona stacio ĉe la Silka Vojo. Ni rapidis tien, tamen pro printempa malvarmo rozoj ankoraŭ ne floris.

Jam de la antikveco rozoj estas famaj en Ĉinio. Ilia hejmloko estis la nuna urbo Xi'an. Historiaj libroj notas, ke jam antaŭ la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-25 p.K.) tie kulturiĝis rozoj. Post la 7-a jc ili kreskis en multaj lokoj sude de Yangzi-rivero. En 1823 iu Kushui-


ano konportis de Xi'an al sia hejmloko eltranĉitan branĉon de ruĝa rozo kaj de tiam tiu florplanto enradikiĝis en la loko.

En Kushui putakvo estas amara kaj riĉas fluoro. La loĝantoj do akvumas florojn per degelinta neĝo el Qilian-montaro. Kun longatempa suna prilumado kaj favora grundo la akvumitaj rozoj kreskas pompe. En la meza kaj lasta tagdekoj de majo ĉiujare, kiam la rozoj disfloras, ĉie en la aero ŝvebas bonodoro.


Rozo estas uzata ankaŭ por aromigi konfitaĵon, teon kaj vinon. Ĝi efikas al sangocirkulado kaj malkongesto. En la festotagoj la tieaj virinoj preparas kukojn kun konfinitaj rozoj por propra manĝado kaj donaco al siaj parencoj. Tie oni regalas gastojn ankaŭ per roza teo.

Antaŭ 20 jaroj oni sukcese produktis roz-oleon en Kushui kaj tiu antikva loko estis denove atentita de eksterlandaj komercistoj. Roz-oleo estas fama aromaĵo. En la in-

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO







1. Melkado
  2. Sur la stepo Zhaxixiulong
  3. Tibet-nacia knabino
  4. Gastamaj tibet-naciaj paŝtistoj
  5. Rajdkonkurso
- Foto de **HUA CEBIAN**

1	2	3
4	5	



ternacia merkato oni aĉetas unu kilogramon da roz-oleo kontraŭ 1-4 kilogramoj da oro. En la mezo de la 80-aj jaroj la roz-kampoj de Kushui atingis 530 hektarojn kaj la produktokvanto de rozoj konsistigis 80% de tiu de Ĉinio.

Por fari roz-oleon oni devas pluki rozojn frumatene, ĉar tiam la floroj estas plej freŝaj kaj plej aromaj. Pluki florojn estas okupo propra al virinoj. Frumatene, kun korbo sub la brako ili iras al rozĝardeno kaj antaŭ tagmezo ili jam portas korbojn da freŝaj rozoj al la metiejo.

### ĈINA "CIGANA VILAĜO"

En la gubernio Yongdeng estas la vilaĝo Xuejiawan (Ŝjueĝjaŭan). Ĝis hodiaŭ oni ankoraŭ ne scias pri la etna deveno de la vilaĝanoj. Samkiel en la proksimaj lokoj, ankaŭ la domoj en tiu ĉi vilaĝo estas leŭsaj. Kvankam ĝi tute harmonias kun la Leŭsa Altebenaĵo, tamen ni rimarkis ĝin. Ni vidis ĉe la vilaĝa enirejo, ke ĉiuj beboj estas tenataj de viroj en la brakoj aŭ sur la dorso.

La viroj estis tre afablaj al ni, scivolemaj vizitantoj. "Kie estas la patrino de la infano?" mi demandis iun viron. "Ŝi iris viziti parencojn," respondis la viro. "Kie estas la avino de la infano?" mi turnis min al alia viro, kiu tenis sian nepinon je la mano. "Ŝi iris viziti parencojn," respondis la samon la maljunulo. Mia akompananto diris al mi, ke tie la vortoj "iri viziti parencojn" signifas "fari aŭguron", ĉar oni ne ŝatas rekte paroli pri la aferoj de virinoj.

La virinoj de Xuejiawan-vilaĝo migras de generacio al generacio kaj vivtenas sin per aŭgurado. Pro tio oni nomas ilin ĉinaj ciganoj. De kie ili venis, neniuj scias. Tamen oni estas certa, ke iliaj prapatroj iam faris aŭguradon por komercistoj, veturigistoj kaj turistoj ĉe la Silka Vojo.

La aŭguristinoj estis vestitaj aparte. Kun alta hartubero sur la kapo tegita per longa nigra tuko, ili portis robon kun larĝaj manikoj,



En tibet-nacia familio




En la vilaĝo Xuejiawan

lozan pantalonon kun striktaj kru- rumoj kaj boat-formajn ŝuojn kun nub-formaj brodaĵoj. Tamen nun tre malmultaj portas tiajn vestojn.


Oni diris al mi, ke ilia aŭgurado estas trafa. Ni do intencis provi tion. Ni serĉis aŭguristinon, sed vane. Fine ni venis en la hejmon de

84-jara maljunulo. Li sidis sur longa terlito. Informiĝinte pri nia intenco, li diris al ni, ke lia filino laboras en urbo, kaj en la hejmo ne estas ankaŭ lia bofilino. "Ĉu vi bonvolus aŭguri por li?" nia akompananto fingre montris al raportisto s-ro Han. La maljunulo ĝoje jesis. Pririgardante la vizaĝon de s-ro



Ĉe preĝ-radoj

En templo





Wushaoling-monto en printempo

Foto de NIU JIRONG



Plukado de rozoj

Foto de ZHANG HESHENG



Han, li demandis pri ties naskiĝtago kaj horoskopo. Li pririgardis liajn manojn kaj ekmurmuris. Nia akompananto diris al mi, ke tio, kion li murmuris, estas slango.

La vilaĝanoj de Xuejiawan ne edz(in)iĝas al hanoj, por ke ne malkaŝiĝu la sekreto de aŭguro. Antaŭ la edziniĝo de filino la gepatroj dotas ŝin per bastono kaj tolsako, simbolo de vivtenilo post la edziniĝo.

En la loko, kie ne troveblas virinoj, la viroj faras dommastrumadon: flegi infanojn, prepari manĝaĵojn ktp. Ili estas multe pli liberaj ol la virinoj, kiuj klopodas por ĉiutaga vivo.

Fakuloj tre interesiĝas pri la etna deveno de la loĝantoj de Xuejiawan. Pri tio ili havas malsamajn opiniojn. Iuj diris, ke ili estas indiĝenaj mjaŭoj. Aliaj asertis, ke ili estas posteuloj de la antikvaj ekspedicioj. Triaj opiniis, ke ili estas posteuloj de la antikvaj ciganoj el la Okcidenta Azio.

## **BELA STEPO ZHAXIXIULONG**

Kiam antaŭ niaj okuloj aperis la bela stepo Zhaxixiulong kaj blankaj gruntbovoj sur ĝi, ni sentis grandan ĝojon kaj tuj mallaciĝis.

La stepo estas la plej fekunda en la Tianzhu-a Tibet-nacia Aŭtonoma Gubernio. Tiam la verdverdaj herboj kovris la stepon, sur kiu paŝtiĝis blankaj gruntbovoj.

Gruntbovoj estis meritoplenaj transportantoj sur la Silka Vojo. Antikve la komercaj karavanoj dependis sole de gruntbovoj por transiri la monton Wushaoling. Malsataj, ili trinkis gruntbovan lakton, kaj malvarmaj, ili sin kaŝis en tendoj el gruntbova felto. La blankaj gruntbovoj vivantaj en la tibet-nacia regiono sub la monto estas raraj en la mondo. Ili kapablas iri 30-40 km ĉiutage sur alta monto, portante pli ol 100 kg da ŝarĝo sur la dorso. Oni nomas ilin boatoj sur altebenaĵo.

Paŝtistoj ŝerce diris al mi, ke la gruntbovoj blankiĝis, trinkinte sanktan akvon de sur la neĝkovrita

monto Maya, 4 440 m super la marnivelo, sude de Wushaoling. Sur la monto kuŝas la Ĉiela Lago. Legendo diras, ke paro da knabinoj batis la ĉielan tamburon por vekti la drakoreĝon en troseka jaro, kiam la stepo velkiĝis. La drakoreĝo vektiĝis kaj faligis abundan pluvon. La knabinoj savis la vivantojn sur la stepo el danĝero de morto, sed ili transformiĝis en la Ĉielan Lagon. De tiam la 5-an de la kvina monato, ĉiujare, laŭ la luna kalendaro, la paŝtistoj kolektas sovaĝajn florojn kaj saŭsureojn (*Saussurea involucrata*) kaj ĵetas ilin en la lagon por rememori ilin.

## **EN ZHAXIXIULONGXIANG**

En la nomita loko vivas ekskluzive tibet-nacianoj. Tie ĉiu familio bredas 70-80 blankajn gruntbovojn kaj ĉ. cent ŝafojn. Ili vivtenas sin per paŝtado, tamen ne plu vivas nomadisme. La fiksloĝejo estas ĉe la vintra paŝtejo. Ili ne nur paŝtas, sed ankaŭ terkulturas. Somere la paŝtistoj paŝtas fore de la loĝejo.

Ni vizitis la hejmon de paŝtisto Wama Cairang. Lia loĝdomo ne multe diferencas de tiu de hanoj. Sur la pordo de la domo vidiĝas ankaŭ ruĝaj versparoj por festotago. Se ne estus selo, pendanta sur muro de la ekstera ĉambro, ni ne eksciis, ke li estas posteulo de tibetano. En la hejmo de Wama odoras butera teo. En la korto pendas bovaĵo sekigata kaj ekster ĝi stokiĝas bovfekaĵo por hejti. Tiam la edzino de Wama hejtis la fornon per la fekaĵo kaj komencis prepari por ni buteran teon.

La bonodora butera teo estis farita el lakto de blanka gruntbovo. Wama diris: "Nun estas tempo, kiam la gruntbovinjoj mamnutras siajn idojn, alie mi melkus pli da lakto por fari el ĝi jahurton por vi."

La paŝtejo de Wama estas bazo por selektado de bonrasaj gruntbovoj en Gansu-provinco, tial li tre zorgas pri bredado de blankaj gruntbovoj. Li ne nur legas librojn pri bredado, sed ankaŭ petas benon de Budho: Li pendigis blanktolajn flagojn kun tibetlingvaj sutraj vor-

toj kaj ruĝajn tolstriojn. Li diris al mi, ke tio celas forigi malfeliĉon kaj protekti la bestojn.

La braveco de tibetaj paŝtistoj en surĉevala pafado plene montriĝas en rajdkonkurso sur la stepo. Al la konkurso partoprenas rajdistoj de pluraj nacioj, tamen la regularo baziĝas sur la tibet-stila. Oni premias la unuajn 13 rajdistojn. La 13-a estas eĉ pli glora ol la unua. Li estas salutita de ĉiuj aliaj kaj ricevas pli da blankaj rubandoj ol aliaj. Legendo diras, ke antaŭ 1 300 jaroj la tibeta reganto Sunzamkampo ordonis okazigi rajdkonkurson por bonvenigi principon Wencheng de Tang-dinastio, kiu venis al Tibeto por edziniĝi al li. Li persone partoprenis la konkurson kaj invitis la principon esti juĝanto. Rezulte, Sunzamkampo ricevis la 13-an lokon. Por montrisian estimon kaj amon al la tibeta reganto, principo Wencheng decidis premii la unuajn 13 sukcesintojn en la rajdkonkurso. Krom la premiaĵo, ŝi persone prezentis al Sunzamkampo ankaŭ blankan rubandon. Poste, memore al la amikeco inter la tibetanoj kaj hanoj, oni ĉiam observas tiun ĉi regularon.

En la konkurso la plej interesa estas marŝokonkurso sur ĉevaloj. Oni konkuras ne nur pri rapido, sed ankaŭ pri ĉevaliro: Ĉiuj ĉevaloj devas samtempe paŝi per samflankaj piedoj kaj ne devas fari eraron. La moro daŭras de la antikva Ĉinio.

Wama diris al mi, ke ĉiuj paŝtistoj amas ĉevalojn, sed nun por ili rajdado sur ĉevalo estas malofta, tial oni lasas la ĉevalojn paŝtiĝi sur malproksimaj herbejoj kaj post kelkaj monatoj rigardas ilin tie.

Informiĝinte, ke ni preparas nin por transiri Wushaoling-monton, lokanoj konsilis al ni: "Vestu vin pli multe por ne malvarmumiĝi."

Vere, sur la monto frostis somere. En lanvesto mi ankoraŭ ne povis rezisti kontraŭ la malvarmo. Mi vere enviis la paŝtiston, kiu en feltaĵo paŝtis ŝafojn sur la stepo. Sub la lazura ĉielo li kun siaj ŝafoj migris malproksimen... ■

# La infanoj retrovu siajn sensojn

**E**N Pekino estas centro por kuraci perturbon de infanoj en sens-integrigo. Tuj antaŭ ĝia pordo mi aŭdis ĝojan krion de infanoj. Endomiĝinte, mi vidis, ke iuj kangurue saltas tien kaj reen en retsakoj; aliaj kun etenditaj brakoj falas de sur sidglitejo; triaj

Kelke da kanguruo-ludantoj stumblis foje refoje kaj la infanoj en sidglitejo de tempo al tempo devojiĝis...


Prof. Dai konigis plue, ke la normalaj homoj povas efike integri en la nervaj centroj la informojn ricevatajn de tuŝado, vidado, flarado kaj gustumado, kaj la cerbo faras rekonon, juĝon kaj komandon, por ke la tuta organismo faru efikan kaj harmonian funkcion.

Se okazas ia perturbo al la sens-integrigo, do la tuta organismo ne povas efike funkcii. Tiam estas malhelpataj la altklasaj rekonadaj funkcioj, kiaj atento, organizado, sinregado, resumado kaj kompreno. Jen kial la infanoj estas malhelpataj en la lernado kaj sportado.

La rekonado kaj kuracado de tiaj anormalaj fenomenoj de infanoj komenciĝis jam antaŭ multaj jaroj eksterlande, dum en Ĉinio antaŭ nur kelkaj jaroj. El tiu kuraca centro oni povas konkludi, ke la kuracefiko far ĉinaj kuracistoj estas kontentiga. Ili, ĉerpinte spertojn de alilandaj kolegoj kaj surbaze de la trajtoj de ĉinaj infanoj, faras la planon por kuracado. Oni ekzamenas ĉiun malsanan infanon en lia unua vizito al la centro por

koni la kaŭzon de lia perturbo en sens-integrigo kaj fari konvenan planon por lia ekzercado. En la ekzercejo de la centro estas pli ol 20 sportaj instrumentoj, kiaj ŝtupa paralelo kaj glittabulo. En trejnado la infanoj povas ricevi senson kaj inciton laŭ plano kaj rezulte de tio ili firmigas kaj plibonigas sian integran kapablon de la cerba nervosistemo. La trejnado povas havigi al la infanoj kapablojn sin ekvilibrigi, regi kaj harmoniigi kaj finfine akceli la maturiĝon de ilia cerbo.

La patrino de iu infano diris: "Mia filo estis saĝa en la infaneco. Li tre rapide ellernis ĉion, kion oni instruis. Sed poste oni ne sciis, pro kio li ne bone lernis en la lernejo. Instruistoj diris, ke en leciono li



Trejnado de rapida movo

kun ridego grimpas en la cisterno plena de globoj...

Se mi ne sciis pri tiu centro, mi certe opinius, ke tio estas malgranda amuzejo. Ĉu vere estas ia perturbo ĉe tiuj gajaj kaj viglaj infanoj?

Prof. Dai, fakulo pri perturbo en sens-integrigo, diris al mi, ke tiuj ĉi infanoj estas fortaj kaj ilia inteligenta kvociento estas nemalalta. Tamen ili vere suferas de io, nome, sens-integriga perturbo. Prof. Dai kun rideto admonis: "Pririgardu atente, ĉu estas ia perturbo ĉe ili?"

Vere, en la ludo okazis nemalmulte da misfaroj. Iu knabo, kiu ekzercis sin por trairi urbopordon, senatenteme faligis urbomuron el plasta spongo.



Ekzercado sur trabo

ludis skribilojn kaj iafoje eĉ sin ŝovis sub tablon. Mi opiniis, ke li suferis de senripoze moviĝema malsano, sed nun mi estas certa, ke li suferas de perturbo en sens-integrigo." Fakuloj opinias, ke juĝate laŭ la homaj kapabloj ĉia malfruiĝo de la disvolviĝo de vidado kaj aŭdado povas kaŭzi perturbon de atento. Por kuraci ĝin estas diversaj metodoj. Tamen estas unu komuna, t.e. trejni atentemon de la infanoj kaj instigi ilin fari la aferojn bezonantajn koncentradon de atento. En la trejna plano legiĝas: "Glitumilo, paralela stablo, alterna bato de pilko, grimpa puŝado de globoj..." Alia homo diris: "Mia filino antaŭe ofte skribis erare aŭ preterlasis vortojn en plenumo de hejmaj taskoj. Mi ofte kritikis ŝin pro ŝia malatentemo. Kuracisto de la centro post ekzameno konkludis, ke ŝi suferas de vidadata perturbo. Kaŭze de nistagmo ŝi ne povis kapti ĉiun novan objekton. Pro maloportuneco de la okuloj ŝi skribis ofte erarajn ideogramojn kaj preterlasas ilin." En la centro oni do trejnas ilin en ludo kaj krome lasas ilin kolorigi paperajn kubojn kaj fari papertondaĵojn.

Kial oni kuracas ilin en ludado? Ĉar multaj kaŭzoj, denaskaj kaj akiritaj, povas estigi perturbon en sens-integrigo de la infanoj, ekz. nesufiĉa nutraĵo kaj sporto de la patrino dum la gravedeco, tro malgranda spaco de movado por infaneto kaj la teleregaj kaj sonregaj ludiloj. Unuvorte, nesufiĉa sportado kaŭzistion. En 1985 scienc-esplora departemento faris specimenan enketon al pli ol 2 000 infanoj kaj post tio oni trovis, ke 10-30% de la enketitoj suferas de perturbo en sens-integrigo iagrade. Koncernaj fakuloj antaŭvidis, ke kun ŝanĝiĝo de la moderna familia vivo kaj socia medio tiu procentaĵo povas leviĝi plu. La trejnado en ludo estas efika por 85% de tiaj infanoj.

La patrino de la 6-jara knabo Han Weixi (Han Ŭejŝji) diris, ke antaŭe la knabo faris multajn mal-

agrablaĵojn kaj estis malakceptita de pluraj infanĝardenoj. Ĉi-foje li venis de la suda parto de Ĉinio por esti kuracata ĉi tie.

Por trejni tiajn knabojn oni devas havi pli da pacienco. En la unua tago de la trejnado Han flamiĝis, batis kaj mordis la instruiston, ĉar ĉi tiu malpermesis al li kunporti kokidon en trejnejon. Poste la similaj aferoj okazis plurfoje. Li ĵetis la glittabulon sur la piedojn de la instruisto, puŝis aliajn knabojn teren... Malgraŭ ĉio ĉi tio neniu rigardis lin malbona infano. Ne rimarkite, Han fariĝis bona, kiun eĉ lia patro opiniis nekuracebla. Foje, post trejnado li memvole helpis la instruiston en ordigo de trejniloj. Aŭdinte laŭdojn de la instruisto, lia patrino kun larmoj brakumis sian filon.

Instruisto Zhao (Ĝaŭ), kiu trejnis Han, kun profunda sento diris al ni, ke oni kutime rigardis la infanojn, kies sens-integrigo perturbiĝas, malbonaj, tio estas ne justa, ĉar ili faris iujn nedecajn aferojn senkonscie pro sia perturbo en sens-integrigo. Se oni ne distingas la kaŭzojn kaj sole riproĉas ilin kaj eĉ damaĝas ilin, tio gravigas ilian perturbon. Instruisto Zhao diris ankaŭ: "La trejnado de la nervokonduto estas utila al plibonigo kaj forigo de la nervokonduta misfunkcio de la infanoj, tamen la radikala solvo bezonas naturan kaj senĝenan vivmedion en la hejmo kaj socio, por ke la infanoj kulturu siajn bonajn sens-kapablojn kaj aliajn karakterojn en la senĝena ludado." ■

## ABONTARIFO DE EPĈ POR 1997

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Totale
Aŭstralio	AUD	19,00	16,00	35,00
Aŭstrio	ATS	192,00	128,00	320,00
Belgio	BEF	575,00	375,00	950,00
Britio	GBP	10,00	6,00	16,00
Germanio	DEM	28,00	18,00	46,00
Finnlando	FIM	61,00	50,00	111,00
Francio	FRF	88,00	62,00	150,00
Israelo	USD	14,00	12,00	26,00
Italio	ITL	20200,00	13800,00	34000,00
Japanio	JPY	1700,00	1300,00	3000,00
Kanado	CAD	17,00	15,00	32,00
Nederlando	NLG	28,00	23,00	51,00
Nov-Zelando	NZD	26,00	22,00	48,00
Svisio	CHF	23,00	17,00	40,00
Usono	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO A	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO B	USD			15,00
TARIFO C	USD			10,00


**TARIFO A:** Ĉiuj landoj en Eŭropo escepte de tiuj menciitaj en la kategorio TARIFO C.

**TARIFO B:** Korea Respubliko, Singapuro, Hongkong, Turkio, Meksikio kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko.

**TARIFO C:** Ĉiuj landoj de Orienta Eŭropo (inkluzive de Estonio, Latvio, Litovio, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj eks-Jugoslavio) kaj ĉiuj ceteraj landoj en Azio kaj Afriko ne menciitaj supre.

**Rim.** Por aerpoŝta sendo bonvolu aldoni 10,00 usonajn dolarojn.

# Mia dektaga vojaĝo en Guangxi (II)



## PARADIZO SUR LA TERO

Adiaŭinte la vilaĝon de dongoj, ni orienten veturis je 50 km laŭ monta vojo kaj atingis la termofonton Ailing en plurnacia aŭtonoma gubernio.

La fonto ĉe Ailing-rivereto estas ĉirkaŭita de montoj kovritaj de primitivaj arbaroj. Kiam ni atingis la lokon, jam vesperigis. Tamen en la profunda montvalo regis gajeco kaj brilis lampoj. Tie estas granda turisma loko.

Formetinte la pakajon, ni ekbanis nin en la vaporriĉa termofonto. Rigardante la vaporon levigantan al la ĉielo kaj aŭskultante fluadon de la fonto en la kvieteco de la naturo, ni sentis nin kvazaŭ en fea lando kaj tuj malaperis nia laco pro veturado dum sinsekvaj tagoj. Jen kial oni nomas la lokon "Paradizo sur la Tero".

Ĉirkaŭ la fonto estas multaj vidindejoj, sed bedaŭrinde, pro

manko de tempo ni vizitis nur lignajn etaĝdomojn de jaŭ-oj en la sekva tago.

Sur ŝtupar-kampoj proksime de la termofonto imponas giganta roko, kiun la lokanoj nomas Longsheyan (Roko de Draka Lango). Elaŭtiĝinte, ni supreniris laŭ ŝtuparo por rigardi ĝin. Kiam ni atingis la alton de 200 m, aperis antaŭ ni bela vilaĝo de jaŭ-oj.

Nia ĉiĉerono kondukis nin al hejmo de jaŭ-oj. Antaŭ ol endomiĝi, li komencis reciproki popolkanton kun jaŭ-a knabino. Samkiel mjaŭ-oj kaj dongoj, ankaŭ jaŭ-oj ŝatas buteran teon. Kiam ni eniris en la lignan etaĝdomon, la gastama jaŭ-a knabino ekpreparis por ni buteran teon. Momenton poste, la varma kaj bongusta butera teo pretiĝis. Kun agrabla kanto ŝi proponis al ni ĉiuj po taso da teo. Kiam ni ne sciis kion fari, tenante la tason en la manoj, nia ĉiĉerono dankis

ŝin per kanto je nia nomo. La jaŭ-aj knabinoj plejparte estas lertaj en kantado. Kantoj sekvis unu post alia kaj ni kun granda plezuro ĝuis ilin, trinkante bongustan teon.

## VIZITO AL ZIJANG-RIVERO

Post pli-ol-2-hora veturado nordorienten de la termofonto ni alvenis al la fonto de Zijiang-(Ziĝjang)-rivero, la plej granda en la loko.

Akompanate de jaŭ-a ĉiĉerono, ni vizitis la riveron en la sekva tago. Ni laŭflue veturis per 2 lignaj boatoj. Tiam aŭdiĝis de la alia boato agrabla kanto de nia ĉiĉerono. Mi estis elektita reciproki kanton kun ŝi. Sed mi devis reciproki kun ŝi nur ĉirku-lantajn amkantojn, ĉar mi ne sciopovis kanti tieajn popolkantojn. Kompreneble, mi, nelerta en kantado, ne povis rivali kun la jaŭ-a knabino.

Sur la serpentanta Zijiang-rivero ni jen rapidis antaŭen laŭ la torenta fluo, jen malrapidis sur kvieta akvosurfaco, multe ĝuante ĉarmajn pejzaĝojn borde de ĝi, kiaj la Giganta Velsimila Ŝtono, Granda Budhosimila Roko kaj Dia Elefanto Trinkanta Akvon.

Pasinte preter la Dia Elefanto Trinkanta Akvon, niaj boatoj ŝanĝis la direkton ĉe la kurbiĝo de la rivero. Antaŭ ni aperis la plej granda vilaĝo de jaŭ-oj borde de la rivero. La vilaĝaj "reĝo" kaj "floro" kaj aliaj gvidataj de ili bonvenigis nin ĉe la rivero. Tuj kiam ni surbordiĝis, ili proponis al ni vinon kaj prezentis por ni interesajn tradiciajn morojn porti novedzinon surdorse, danci rondan dancon ktp.

Unu el ni estis elektita kiel "novedzo" kaj spertis la moron porti novedzinon surdorse. Gvidate de la "reĝo", li unue kondukis la "novedzinon" kun ruĝa tuko sur la kapo al la bordo de la rivero por lavi al ŝi la manojn kaj poste ŝin surdorsigis. Sed li, kvankam alta kaj forta, 2-foje faligis la "novedzinon" surteren. Ĉiufoje oni trinkigis al li 3 tasojn da vino kaj ŝminkis lin. Feliĉe, la "novedzino" ne falis en la 3-a fojo, alie la "novedzo" estus ĵetita en la riveron, kiel edzo nekompetenta. Kiam li portis ŝin surdorse al difinita loko, ili ambaŭ riverencis al la ĉielo kaj tero unue kaj poste unu al la alia. Post kiam la "novedzo" deprenis la ruĝan tukon de sur la kapo de la "novedzino", ŝi kondukis lin al la bordo de la rivero kaj lavis al li la vizaĝon. Tio nomiĝas aspergo per feliĉa akvo.

Spertinte la popolan moron, ni denove enboatiĝis kaj daŭrigis nian vojaĝon. Tiam jaŭ-aj knabinoj kolektiĝis sur la bordo de la rivero kaj aspergis nin per rivera akvo.

## ĈARMAJ PEJZAĜOJ

Veturinte de la fonto de Zijiang-rivero suden je 70 km, ni vizitis Lingqu(Lingĉju)-kanalon fositan antaŭ 2 000 jaroj. Poste ni vojaĝis al Guilin kun la plej bela pejzaĝo en Ĉinio.

Lijiang(Liĝjang)-rivero, kiu pro Guilin ĝuas grandan famon, fluas 84 km de Guilin al Yangshuo. Ĝi, kiel verda rubando, zigzagas inter montoj. Ambaŭflanke de ĝi staras kuriozaj montpintoj kaj prosperas verdaĵoj.

Ni vizitis ĉefe la pitoreskan monton Guanyan, nove ekspluatitan, ĉe la meza parto de Lijiang-rivero. Ĝi similas al imperiestra krono de la antikva Ĉinio. En la kaverno murmuras subtera rivero longa je pli ol 10 km kaj estas stalaktitoj, stalagmitoj kaj lafoj similaj al kurteno, kolono kaj floro.


Tiutage ni trankvile en Yunwu-hotelo proksime de la rivero. La domoj havas blankajn murojn kaj blujajn tegolojn kaj distingiĝas per arkitektura stilo de norda Guangxi. Ĉirkaŭ la hotelo ĉarmas montpintoj kaj dissemiĝas vilaĝoj sur la kampoj.

Vizitante Lijiang-riveron, ni veturis al Fengyu-kavernaro 50 km fore. La subtera rivero en ĝi abundas je fiŝoj. Kun longo de 5.3 km la kaverno interligiĝas kun 9 montoj. En ĝi troviĝas de-

koj da kavernoj grandaj kaj malgrandaj. La plej granda el ili areos 25 500 kvadratajn metrojn, kun alto de 36 m, kaj nomiĝas la Unua Kaverno de Azio. Nun oni jam malfermis en la kaverno pli ol 200 vidindaĵojn, el kiuj la plej majestaj estas la Regno de Pagodoj, Paradizo de Mirakloj, Fea Lando Penglai...

\* \* \*

Dum tiuj 10 tagoj ni vojaĝis en 8 gubernioj kaj 2 urboj en la



Pejzaĝo "Dia Elefanto Trinkanta Akvon"



Bonvenigo de gasto per vino

meza kaj norda partoj de Guangxi. Ni ĝuis tieajn ĉarmajn kaj kuriozajn pejzaĝojn kaj spertis diversajn popolajn morojn. Se vi havas ŝancon viziti Guilin, vojaĝu pli foren kaj vi havos pli interesajn kaj pli belajn travivaĵojn. ■

# RAPORTO EL INCENDIITA ARBARO



La nova aspekto de Mohe

Teksto de ZHAO BOPING  
Fotoj de ZHAO XI

*Min tre interesas arbaraj aferoj. Laŭ mia memoro, en norda Ĉinio brulis granda arbaro. Kia stato nun estas en la brulinta arbaro? Ĉu la arbaro bone mem plantiĝis kaj renoviĝis. Kaj kiajn arbospecojn ĝi havis antaŭ la brulo kaj kiajn specojn nun tie kreskas? Mi deziras, ke vi raportu pri arbaraj aferoj en via gazeto.*

SAARI (Finnlando)

**L**A Granda Xing'an-montaro situanta en la norda parto de Ĉinio estas grava arbara regiono de Ĉinio. Pinoj kaj larikoj ĉie prospere kreskantaj faras la tutan montaron ombroriĉa verdejo.

Kiel ĝi statas nun post la eksterordinara arbara incendio okazinta en majo 1987?

## TRANS LA GRANDAN XING'AN-MONTARON

Nia trajno veturis en la direkto al la Granda Xing'an-montaro. Iom post iom freŝiĝis la aero, kaj senĉese alternis la pejzaĝoj ekster la fenestro.

Tuj kiam la trajno eniris en la arbaran regionon, vidiĝis ambaŭflanke de la trako vastaj arbaroj. Dikaj kaj rektaj larikoj kaj pinoj staras majeste, elspirante densan rezinan aromon. Sur la grandarea subakviĝinta tereno prosperas akvaj plantoj kaj sovaĝaj floroj. Mirige kvietas la arbaro, apenaŭ trov-

eblas homa spuro. Hazarde sciuro kuras sur arbo kaj aglo ŝvebas en la ĉielo.

Kiam la trajno daŭrigis la veturadon norden, la sceno prezentata antaŭ miaj okuloj montris, kian damaĝon kaŭzis tiu 28-taga terura incendio al la Granda Xing'an-montaro: Dikaj arboj atakitaj de la brulego estis segitaj je la radikoj, kaj restas nur nigraj stumpoj. Kalkulate laŭ la diametro de la stumpoj, tiuj arboj aĝis pli ol cent jarojn. Laŭ statistiko, la incendiita arbaro kovras areon de 1.44 milionoj da hektaroj, kaj la kvanto de la forbruligita stokita ligno estas 850 000 kubmetroj.

## REVIVIGI LA ARBARON

Jam 9 jaroj pasis de la incendio. La lokanoj antaŭlonge konsciĝis post la profunda doloro kaj per siaj manoj kulturis novan verdejon.

Ĝuste apud la loko, kie komen- ciĝis la incendio, fortaj pinoj plantitaj nelonge post la plago nun altas je pli ol du metroj. Rigardata

de malproksime, la pinoj viciĝas bonorde, impresante per potenca vivipovo.

S-ro Wang Yongguang, estro de la Forst-administracio Xilinji (Ŝjilingji) situanta en la incendia centro, diris al mi, ke en restarigado de la arbara regiono oni alprenas homan rearbarizon kaj naturan rearbarizon home akcelitan kiel la ĉefajn metodojn. La unua metodo povas tuj doni efikon, tamen bezonas pli da mono, kaj la dua povas redukti produktokoston. Oni faras tion kiel jene: En la incendiita loko oni forigas la herbojn per buldozoj kaj traktoroj, malkovrante la grundon, por ke la semoj de la neforbruligitaj arboj ĉirkaŭaj falu rekte sur la grundon kaj burĝonu. En la pasintaj 9 jaroj la forst-administracio rearbarizis 51 000 hektarojn per homa forto kaj 24 000 hektarojn per natura rimedo home akcelita. La efiko estas kontentiga. Aparte ĝojige estas, ke iom post iom multiĝas en la arbaro sovaĝaj bestoj, kiaj alko, cervo kaj kapreolo. Tio montras, ke restari-

ĝas ankaŭ la detruiĝinta ekologia medio.

Kompreneble, ege malfacilas la restarigado. En la centra arbido-kulturejo de la Forst-administracio Xilinji videblas bedo ĉe bedo da arbidoj semodevenaj. Laŭ aspekto ili estas maldikaj kaj delikataj. Oni diris al mi, ke de post 1988, kiam la arbido-kulturejo estis plivastigita, ĝi jam liveris al la incendiita arbaro 420 milionojn da diversspecaj arbidoj bonkvalitaj. Oni menciis studenton Li Zhidan (Li Gidan). Kune kun aliaj kulturistoj li transportis grasan teron de loko 7 kilometrojn fore kaj formis arbido-kulturejon el marĉo. Sed pluvego okazis nur kelkajn tagojn post burĝonado de la arbidoj. Li senhezite saltis en la akvon profunde ĝistalie por fortikigi la akvobaraĵon, sekve la arbidoj saviĝis. Poste li enkondukis novajn teknikojn pri kemia sarkado kaj raratero sterkado. Tio duoble kreskigis la produktokvanton de larikidoj novsemitaj, finis tian situacion de la forst-administracio, ke 90% de ĝiaj arbidoj estis liveritaj de aliaj lokoj, kaj faris la arbido-kulturejon moderna ĝardeneska arbido-kultura bazloko en la norda parto de Ĉinio.

En la plagita arbaro kun areo de 1.44 milionoj da hektaroj oni faris kompletan laboron de restarigo. Ĝis nun oni rearbarizis 186 500 hektarojn per homa forto kaj 94 500 hektarojn per natura rimeado home akcelita. Samtempe kun tio, ĉiuflanke disvolviĝas ankaŭ la natura rearbarizo kaj la forstumado sur blokitaĵoj.

## NOVA GUBERNIA URBO EN ARBARO

Mohe estas gubernia urbo situanta ĉe la norda fino de Ĉinio. Krom la grandarea arbaro, la incendio englutis ankaŭ tiun gubernian urbon en la arbaro. La urbo distancas nur 10 kilometrojn for de la ekbruligita loko. Posttagmeze de tiu tago, helpe de 7-8-gradaj ventegoj, la incendio furiozis kontraŭ la urbo, rezulte

260 000 kvadrataj metroj da domoj estis cindrigitaj kaj personoj de pli ol 3 600 familioj senhejmiĝis.

Ĉiu familio en la urbo havas pli-malpli da rilatoj kun la arbara regiono de la Granda Xing'an-montaro. Samtempe kun la reverdigo de la arbara regiono, restariĝis Mohe nerimarkite en tute nova aspekto. Tial mi surpriziĝis, kiam en miajn okulojn saltis jenaj bildoj: Ĉe la kruciĝo de larĝaj stratoj staras multaj novaj domoj, kiaj magazeno, kinejo, financa centro, turisma servo, hotelo, restoracio kaj infana danca trejnejo. Malantaŭ la domegoj de administracioj estas vicoj kaj vicoj da ruĝbrikaj loĝdomoj de urbanoj. La plagitaj loĝantoj antaŭlonge transloĝiĝis en tiujn novajn domojn. Krome, konstruiĝis ankaŭ televid-relajsturo, lernejo ktp. En la vivo de la tuta urbo ne videblas postsigno de la incendio, sed la fotoj kaj objektoj eksponitaj en la Memorialo de Incendio de 6-a de Majo multe rememorigas pri la incendio.

## ALARMO AVERTU KONSTANTE

Lecionoj de la incendio estas doloraj. La plej profunda instruo por la plagitoj estas havi anticipan rimedon kontraŭ katastrofo, alivorte, la kontraŭfajra alermo avertu konstante. Post la incendio la arbara regiono de la Granda Xing'an-montaro asignis grandan monsumon kontraŭ eventuala brulego, kaj la sumo egalas al la totala sumo asignita dum la pasintaj 20 jaroj. Krome, oni konstruis modernan fajro-preventan sistemon konsistantan el fajro-imuna ŝoseo kaj gvat-turo, prognozo kaj anoncado, gvido super fajro-fontoj, komunika komando, estingado de arbara fajro kaj aliaj rimedoj. Ĉe

vojkruciĝoj, antaŭ pordo de magazenoj, teatroj kaj kinejoj ĉie estas okulfrapa fajro-preventa signo. Ĉe ĉiu enirejo de la arbara regiono establiĝis kontrolejo, kaj la trapasantaj veturiloj devas sin submeti ĝi al rilata kontrolo. Ne fumi eksterdome jam fariĝis disciplino memkonscie observata de la fumantoj. Iu respondeculo de la arbara fajrobrigado diris al mi: "Ĉi-momente ni estas singardemaj, krome, laŭ ekipaĵoj nia fajrobrigado estas avangarda, kaj ni kapablas estingi eksterordinaran incendion."

Restarigo de la arbaraj riĉfontoj en la incendiita arbaro de la Granda Xing'an-montaro estas grandioza sistema bioprojekto. Necesas



Kulturado de arbidoj

proksimume jarcento por reaperigi la originan staton. Kvankam la lokanoj multe penis kaj ricevis helpon de aliaj landoj, tamen ĝis nun 250 000 hektaroj estis ankoraŭ ne aŭ ne tute rearbarizitaj. Serioziĝas la tendenco de herbarizo kaj marĉizo. Kaj sur aliaj 400 000 hektaroj elkreskis la nestabilaj sekundaraj poplaro kaj betularo kun mallonga vivdaŭro (20-30 jaroj) kaj malalta ekonomia valoro. Tial urĝe necesas transformi tiujn arbarojn en lignoproduktejon kun pinoj kaj larikoj kiel la ĉefaj, stabilan je ekologia efiko. Estas ankoraŭ pli malfacila la rearbarizado de tiuj incendiitaj lokoj, tamen la lokanoj kredas, ke certe reverdiĝos tiu ĉi tero de Ĉinio. ■

# Sinapogaj nacimalplimultaj virinoj

de YI ZHOU

**E**N 1989, en Yuxi(Juŝji)-subprovinco de Yunnan, Ĉinio, naskiĝis la Yuxi-a Asocio de Kapablaj Kamparaninoj kun 32 membroj el ji-oj, taj-oj, huj-oj kaj aliaj dekkelkaj nacimalplimulto. Ili volis pere de la asocio kunlabori kaj forigi malriĉecon de sia hejmloko.



Nacimalplimulta virino (meze de la fronto) en la Ĉina Popola Kongreso

En la sama jaro la averaĝa enspezo de la membroj estis 4-oble pli multa ol tiu de la lokanoj, dank' al apliko de scienco al la kamplaboro kaj disvolvado de flankokupo. Helpate de ili, 452 familioj adiaŭis malriĉecon. La asocio ankaŭ monhelpis publikajn aferojn, ekz. konstrui lernejon kaj ŝoseon kaj prizorgi maljunulojn. Nun la asocio havas pli ol 100 membrojn.

Per sia laboro ili gajnis aplaŭdon de la lokanoj kaj montris la memstarecon de la nacimalplimultaj virinoj.

## SPRITAJ KAJ LERTAJ VIRINOJ

En Ĉinio oni nomas virinojn "duonĉielo", ĉar la ĉinaj virinoj, kompreneble inkluzive de la 44 150 000 nacimalplimultaj virinoj, rolas grave ne nur en la familio, sed ankaŭ en la socio, precipe en la moderniga konstruado.

La nacimalplimultaj virinoj estas spritaj kaj lertaj. En la pasinteco ili preparis por si mem dotojn el brodaĵoj, brokaĵoj, lig-tinkturita aŭ vaks-tinkturita ŝtofo, kiuj nun havas grandan debiton en kaj ekster Ĉinio.

En la baj-a vilaĝo Zhouzhuang (Ĝouĝuang) de Dali, Yunnan-provinco, ĉiuj virinoj lertas en lig-tinkturado. Ĉe vojoj kaj ĉe pordoj de loĝejoj, ĉie videblas virinoj sin okupantaj pri lig-tinkturado. Kaj la okupo estas tre enspeziga por la vilaĝo.

La tuĝja-a virino Shi Meiyang faris dorsosakon, murpendaĵon, kusenon ktp. el ŝtofo "ŝjilangka", kiu antaŭe servis kiel materialo por litkovrilo. Je la komenco ŝi portis la de ŝi faritajn metiartaĵojn al urbo por vendi. Ekster ŝia atendo, baldaŭ disvendigis la metiartaĵoj. Foje iu aŭstralia komercisto aĉetis 3 000 dekduojn da tuĝja-aj brokaĵoj. Nun en la loko, kie Shi Meiyang vivas, preskaŭ centmil virinoj sin okupas pri farado de tiuj metiartaĵoj.

## ESTI ARBO ANSTATAŬ LIANO

Iu naŝi-a virino diris: "Virino devas esti arbo anstataŭ liano. Eĉ eta arbo estas sendependa, kaj liano ĉiam dependas de arbo, ĉu ĉi tiu estas alta aŭ malalta." En la nuna Ĉinio eblas por la nacimalplimultaj virinoj fariĝi arbo. Tion garantias la rajtoj por virinoj ricevi edukadon kaj partopreni en politikaj aferoj de la ŝtato.

Antaŭ la demokratia reformado en Tibeto en 1959, la tibetaj virinoj estis nomataj "ĝimaj", kiu signifas malnoblulon. La malnova leĝo de Tibeto difinis, ke virino valoras kiel pajloŝnuro. Preskaŭ ĉiuj virinoj tibetaj, menba-aj kaj loba-aj, kiuj loĝis sur la "Firsto de la mondo", estis analfabetoj.

En la 50-aj jaroj la ĉina registaro ekpraktikis senpagan edukadon en Tibeto, tiel tibetaj knabinoj





Mjaŭ-aj knabinoj brodas rubandon.

havis ŝancon viziti lernejon. Nun el la studentoj en Tibeto ĉirkaŭ triono estas knabinoj. Ankaŭ la menba-oj kaj loba-oj havas siajn studentinojn. Fraŭlino Ĝuoga diplomiĝis el la jura fakultato de altlernejo en Pekino kaj revenis al Tibeto. Ŝi diris: "Mankas al Tibeto juristoj. Tibeto bezonas min, kaj mi devas servi al ĝi."

La tibetaj virinoj fariĝis mastro de sia vivo, ankaŭ de la ŝtato. Inter ili troviĝas multaj elstaraj artistinoj, verkistinoj, instruistinoj, kuracistinoj kaj politikistinoj.

Ĝaŝji Lamu estas tibeta reprezentantino de la Ĉina Popola Kongreso. En 1988, kiam ŝi unuafoje partoprenis la Tutlandan Popolan Kongreson, ŝi prezentis du proponojn: rekonstrui la antaŭlonge eluzitan Baida-flughavenon kaj Ĉangdalama-ŝoseon. Poste la registaro asignis 200 milionojn da juanoj al rekonstruado de la ŝoseo kaj ekde 1991 kompletigis Baida-flughavenon.


## ENHAVE ŜANĜIĜIS EDZINIĜ-KANTOJ

La nacimalplimultaj virinoj bone kantas kaj dancas. Ili kantas ne nur pri sia laboro, sed ankaŭ pri sia edziniĝo. El la novaj edziniĝ-kantoj ni povas vidi la ŝanĝiĝon de ilia edziniĝo.

Laŭ la moro de tuĝja-oj, dum kelkaj vesperoj antaŭ sia edziniĝo, la edziniĝonto devas plore kanti edziniĝ-kantojn, akompanate de siaj familianoj, por esprimi familian intimecon kaj malĝojon pro forlaso de la gepatroj. En la pasinteco, ĝenerale gepatroj aranĝis geedziĝon de gejunuloj, en kiu grave rolis svatanto. En malnovaj edziniĝ-kantoj plejparte estas riproĉo al svatanto. Tio esprimis malŝaton al kontraŭvola geedziĝo. Nuntempe la nacimalplimultaj knabinoj havas liberon de amo kaj edziniĝo, tial la novaj edziniĝ-kantoj laŭdas dolĉan amon anstataŭ riproĉi svatanton.

Iuj tradicioj de nacimalplimultoj estas kateno por virinoj. Ekz., kiam mortis la edzo, huj-a aŭ ji-a virino devis reedziniĝi al lia frato. Se ŝia edzo ne havis fraton, ŝi devis esti vidvino por ĉiam. Tiaj tabuoj jam antaŭlonge estis forĵetitaj. Estas permesate al virinoj eksedziniĝi, reedziniĝi aŭ edziniĝi al viro de alia nacio.

La nacimalplimultaj virinoj ne nur servas al siaj edzo kaj gefiloj, sed ankaŭ rolas pli kaj pli grave en la socio. ■



Makulharaj hundetoj

Karikaturo de Ye Chunyang

## Por mallaciĝo

**K**IAM vi laciĝas pro troa laboro fizika aŭ mensa, faru mildan kaj efikan masaĝon por kiel eble plej rapide trovi forton kaj elastecon de la muskolaj fibroj, tendenoj kaj ligamentoj, kio utilas al reguligo de la homaj organoj por mallaciĝo. Jen simplaj masaĝ-metodoj.

### FROTADO DE LA MANOJ

Forte frotu la du manplatojn unu sur la alia aŭ per unu manplato frotu la mandorson de la alia ĝis varmiĝo. Tio estas utila al sangocirkulado.

### FROTADO DE LA KAPO KAJ VANGOJ

Sidu kaj premu la frunton per viaj du manplatoj. Puŝu la manojn supren kaj poste de la verto al la nuko kaj daŭrigu la puŝadon de la vangoj al la frunto. Faru tion 10 fojojn.

Per la dikaj kaj montraj fingroj prem-knedu la aŭriklojn kaj malforte tiru la orellobojn ĝis varmiĝo.

Tio estas utila al cirkulado de vitala energio kaj sango kaj al cerba funkciado.

### TURNADO DE LA NUKO

Rekte sidu aŭ staru. Laŭeble turnu vian kapon maldekstren-malantaŭen kaj rigardu tiun flankon. Ĉiufoje, kiam vi finas la movon, tuj turnu la kapon al la kontraŭa flanko kaj rigardu ĝin. Faru la du movojn malrapide po 10 fojojn.

### PREM-KNEDO DE LA ŜULTROJ KAJ BRAKOJ

Sidu kaj metu vian dekstran manon sur la maldekstran ŝultron, kun la dika fingro kontraŭ la aliaj kvar fingroj, forte kaptu kaj prem-knedu malsupren la internan kaj eksteran flankojn de la ŝultro kaj brako ĝis la radiko de la pojno. Faru tion 5 fojojn. Faru la samon per via maldekstra mano.

Tio estas utila al la moviĝo de la brakoj kaj glatigo de ĝinglŭo-vojoj.

### MASAĜO DE LA BRUSTO

1. Sidu. Metu vian dekstran manplaton sur la supran parton de via dekstra mamokaj kun iom da forto batu ĝin kaj movu la manplaton horizontale flanken. Faru tion 10 fojojn tien kaj reen.

2. Metu viajn du manplatojn sur la malsupran parton de la brusto kaj per ili forte frotu la bruston 20 fojojn tien kaj reen (Bildo 1).

3. Metu la du manplatojn malsupren de la akseloj kaj puŝu ilin de supre malsupren ĝis la ilioj. Faru tion tien kaj reen ĝis varmiĝo (Bildo 2).

Tio estas utila al cirkulado de vitala energio.

### FRAPADO DE LA TALIO KAJ SPINO

Sidu aŭ staru rekte. Pugnigu viajn du manojn kaj per la pugnoj malforte frapu la talion kaj la spinon de ambaŭflanke. Komencu la frapadon laŭeble de supre de la spino ĝis la sakro. Dum la frapado vi povas fleksi vin malsupren. Faru tion 20 fojojn tien kaj reen.

Tio estas utila al vigliĝo de vitala energio en la renoj kaj al funkciado de la internaj organoj.

### FROTADO DE LA GAMBOJ KAJ GENUOJ


1. Sidu kaj metu viajn du manplatojn sur la internan kaj eksteran flankojn de la dekstra gambo. Puŝu la manplatojn de supre malsupren ĝis la kruro. Faru tion 5 fojojn. Faru la samon al la maldekstra gambo.



Bildo 1  
Masaĝo de la brusto



Bildo 2  
Masaĝo de la brusto



Bildo 3  
Frotado de la genuoj

SUN AIJUN:

# Komforto en strateto

**T**IU strateto ĉe movoplana strato larĝas malpli ol ses m kaj longas apenaŭ 300 m, sen okulfrapaj paneloj. Tamen ĉiuj urbanoj scias, ke en ĝi regas bonordo kaj vivas multaj helpemuloj.

Ambaŭflanke de la cementita strateto staras blankaj loĝdomoj kun pordoj kaj fenestrokrajtoj flave lakitaj. Rigardante tra fendo inter la pordoklapoj, mi vidis, ke la korto estas kvietaj, garnita per bambuoj kaj artefaritaj montetoj. Sur muro antaŭ artefarita monteto ĉe la strateto rampas hederoj kaj la floroj en bedoj ĉirkaŭe tiklas la nazon per bonodoro. Ĉe la unua vido mi eĉ ne rimarkis, ke tie estas latrino.

La komforta strateto estas unu el la stratetoj en la urbo Jingsha, Hubei-provinco, Ĉinio. Antaŭe, tie la ŝtonplata vojo difektiĝis, muroj kadukiĝis kaj malpura akvo estis malfacile ellasebla. Neniu volis vivi plue la maloportunan vivon. Sed neatendite, kiuj ekagis la unuajn por ŝanĝi la staton, estis maljunulinoj en la strateto. Iuj el ili estis emeritaj laboristinoj, aliaj — dommastrinoj. Ĝenerale dirite, laŭ kutimo de ĉinoj, la maljunulinoj, kiaj la supre menciitaj, devas zorgi pri la vivo de sia edzo, flegi sian nep(in)on aŭ kultivi florojn. Sed anstataŭe, ili ekagis por beligi la medion. Ili kolektis monon por ripari vojon kaj partoprenigis la loĝantojn en projektado kaj konstruado de florbedoj kaj transplantado de arboj. Dank'al ilia penado, la strateto tute aliĝis. Nun ili purigas ĝin unu fojon en ĉiu semajno.

Kiam mi promenis sur la strateto, mi sentis etoson harmonian. Ĉe kiosko ludis infanoj kaj babilis tri grizharaj maljunulinoj. Alproksimiĝinte, mi trovis, ke ili portas ruĝan brakbendon kun la vortoj "publika sekureco". Ĉu ili kapablas respondi pri la afero en la strateto? La dubo estas senbaza. En ĝi

2. Sidu kaj metu la du mankavojn tuj sur la genuon. Rotacie prem-knedu la internan flankon de la genuo 20 fojojn. Faru la samon al la ekstera flanko de la genuo (Bidlo 3).

Tio estas utila al fortigo de la gamboj kaj genuoj kaj al elastigo de la tendenoj.



Sur balkono

loĝas 525 familioj kaj multaj geedzoj estas oficistoj kaj laboristoj. Tial ili prenis sur sin la devon konservi pacon en la strateto. Kaj plie, ili povas tuj rimarki la alvenon de fremdulo. Foje, ili kaptis bicikloŝteliston.

Jiao Yanxiu (Ĝjaŭ Janŝiŭ) estas proks. 80-jara. De la 40 jaroj ŝi zorgas pri la publika sekureco en la strateto. Somere ŝi kaj ŝia edzo donis supren kun verdaj fazeoloj al senhelpaj maljunuloj kaj vintre al ili karbon. Kaj krome, ŝi ofte monhelpis al aliaj. Ŝi havas kvin gefilojn, kiuj jam havas sian propran familion kaj loĝas aliloke. Ili intencis loĝigi ĉe siajn gepatrojn. Sed Jiao Yanxiu diris: "Mi bone scias, ke loĝi en etaĝdomo estas multe pli komforte ol en malnova unuetaĝa domo. Tamen, se mi tion farus, mi certe revenus kelkajn tagojn poste al la nuna domo pro manko de malnovaj amikoj." Efektive, ankaŭ aliaj maljunulinoj en la strateto, kiel Jiao, rigardas la komfortan strateton kiel sian propran hejmon.

Mi eniris la korteton n-ro 64 kaj mastro Cao Boming kondukis min laŭ mallarĝa ligna ŝtuparo sur la malgrandan balkonon de sia domo. Ekster mia atendo tie abundis verdaĵo. Li kulturis pli ol centon da vazoj da floroj. Dekkelkaj el ili kreskis en lia korto kaj ĉiuj aliaj en la strateto.

En la strateto ne mankas bonkoruloj. Ili helpas transporti karbon, portas en la domon sekigatajn vestojn por aliaj antaŭ pluvo, preparas tagmanĝon por la lernantoj, kies gepatroj ne povas hejmen reveni tagmeze pro laboro... Ĉe ĉiu semajnfino okazas kantado, dancado kaj konkurso de pentrado kaj kaligrafado en la amuzejo de la strateto.

Sekvante la ekzemplon, la Jingsha-anoj penas por konstrui la urbon en tiun kun komforta medio kaj harmoniaj interrilatoj de homoj. ■

## TURNADO DE LA MALEOLOJ

Sidu. Per unu piedpinto tuŝetu la plankon aŭ iom pendigu ĝin. Turnu la maleolon dekstren kaj maldekstren 20 fojojn. Faru la samon al la alia maleolo.

Tio estas utila al plifortigo de la piedoj. ■

### EKONOMIO

- Post trijara konstruado la Fervojo inter Pekino kaj Jiulong (Ĝiulong) de Hongkong, la plej longa ferŝtala arterio de Ĉinio, lanĉiĝis en la 1-a de septembro 1996.

La fervojo, kun totala longo de 2 553 km, trairas 98 urbojn kaj guberniojn de 9 provincoj kaj municipoj. Ĝiaj ekipaĵoj kaj administraj instalaĵoj estas plej avangardaj en Ĉinio. Ĝi ne nur mildigas la streĉan transportadon de la ĉinaj fervojoj, sed ankaŭ akcelas la ekonomian disvolviĝon de la malriĉaj regionoj ĉe la fervojo.

En la komenca periodo la trajno kuras sur la fervojo 60 km hore kaj la veturado de Pekino al Shenzhen bezonas 48 horojn.

- En Ĉinio estas pli ol 10 milionoj da abonantoj de radiovoko, malpli multe ol en Usono kaj Japanio. En 2000 la nombro de moveblaj telekomunikaj centraloj de Ĉinio superos 500, ĉelara movebla telekomunikado kovros la dense loĝatajn regionojn kaj enretiĝos kun aliaj landoj kaj regionoj.

- Ĝis la fino de 1995 en Ĉinio estis 519 agentejoj de fremdaj bankaj institucioj, kun totala kapitalo de 19.14 miliardoj da usonaj dolaroj.

- La Tajda Elektrejo ĉe Baishakou en la urbo Rushan (Juŝan), Shandong-provinco, konstruita en 1970, jam laboris 64 800 horojn kaj produktis sume 10.8 milionojn da kilovatt-horoj da elektro.

- La plej granda produktlinio de koloraj dekoraciaj platoj de Ĉinio estis finkonstruita kaj transdonita al produktado en Zhuhai de Guangdong-provinco.

Kiel nova supraĵa dekoracia materialo, la kolora dekoracia plato kun buntaj strioj havas eminentajn polurecon, frotorezistecon kaj korod-rezistecon. Ĝi ne nur estas vaste uzata en la dekoraciaj entreprenoj de hejmaj elektraj aparatoj, ŝtalaj mebloj kaj liftoj, ŝipfarado, trafiko kaj domkonstruado, sed ankaŭ malpliigas kaj eĉ nuligas la median poluadon kaŭzitan de antaŭtraktado de ŝtala plato, ŝpruclakado k.a. Nun en la mondo estas nur kelkaj landoj, kiaj Japanio kaj Koreio, povas produkti tian platon.

- Por la konstruata Nanning-Kunming-a

Fervojo, sur la Yunnan-Guizhou-a Altebenaĵo, finkonstruiĝis ponto super valo, kiu altas 183 m de la fundo de la ter-surfaco ĝis la pont-surfaco.

### ARKEOLOGIO

- Arkeologoj de Ĉinio, Usono kaj Kanado per la plej avangarda metodo analizis la plej junan membron el la pekinaj simi-homoj, elfositan el la ruino de pekinaj homoj, kaj konstatis, ke ĝi vivis antaŭ 410 000 jaroj, kaj neis la antaŭan difinon, ke ĝi vivis antaŭ 230 000 jaroj. Tiu konkludo renversis la opinion de la internacia paleoantropologia rondo, ke la pekina simi-homo, kiel la plej tipa reprezentanto de aziaj pitekantropoj, evoluis malpli rapide.

- Dum konstruado de digo, kamparanoj elfosis potpecojn kaj potojn el tombo en Jiangsu-(Ĝjansu)-provinco. En iu poto ili trovis duonpoton da grajnoj similaj al milio kaj sezamo. Koncernaj fakuloj opinias, ke la tombo estis konstruita antaŭ 2 600 jaroj. Agronomoj semis kelkajn grajnoj en vazo. Post 17 tagoj ili ekĝermis. Nun oni faras daŭran esploradon.


### SCIENCO KAJ TEKNIKO

- Dum longa tempo ekzistis en la mondo du opinioj pri la origino de la vivo. Iuj opiniis, ke proteino estas origino de la vivo kaj ke unue estas proteino kaj poste nuklea acido. La aliaj havis tute malsaman opinion.

En internacia kolokvo okazinta antaŭ nelonge ĉina sciencisto Zhao Yufen (Ĝaŭ Jufen) post rigora teoria argumento kaj multaj eksperimentoj konstatis, ke kombinaĵo de unu aminoacido kaj fosforo, nome, fosforoacido-amino, estas semo de la origino de la vivo. Tiu malkovro prezentas brilan perspektivon por apliko en bioingenerio, geneterapio k.a.

- Prof. Yuan Longping, ĉina agronomo pri hibrida rizo, ricevis azian premion de la Japana Ekonomia Novaĵ-agentejo.

Dediĉe al la 120-a datreveno de sia fondiĝo, la Japana Ekonomia Novaĵ-agentejo starigis la internacian premion, cele premii eminentulojn en la ekonomia disvolviĝo de Azio. Prof. Yuan dediĉis pli ol 30 jarojn al esplorado pri hibrida rizo kaj atingis brilajn sukcesojn — levi la hektaran produktokvanton de rizo je 20%. Lia atingo havas gravan signifon por solvi la grenan problemon de la troloĝata Azio.



Prof. Yuan Longping

● Vundo-adhera pansaĵo, grava esplor-frukto de Ĉinio, trapasis ekzamenon de la ŝtato.

Tradicie oni suturas tranĉvundon. Prof. Wang Aiben, direktoro de la Biologia Adherpansaĵa Instituto en Jinan (Ĝjnan), Shandong-provinco, sukcese faris la menciitan pansaĵon post multjara esplorado. La vundo-adhera pansaĵo el altpura natura aktiva substanco ekstraktita el animala histo estas farita per moderna biotekniko. Ĝi estas utila por adhero de tranĉvundo, sangadhaltigo kaj vund-cikatriĝo. En Ĉinio pli ol cent hospitaloj uzis la pansaĵon por ĉ. 30 000 kirurgiaj operacioj kaj ricevis bonan efikon.

● Esplor-grupo el 14 profesoroj, esploristoj kaj superaj veterinaroj komencis la unuaperiodan esploron pri embrio-transplantado de pando en Chengdu, ĉefurbo de Sichuan-provinco. Ili esperas, ke en 5 jaroj naskiĝos la unua "tub-pando".

● D-ro Xiao Chuanguo (Ŝjaŭ Ĉuangŭo) de la Medicina Universitato Tongji (Tongĝji), Ŝanhajo, sukcese faris al paraplegiulo resanigan operacion de veziko. Tio ebligis al multaj paraplegiuloj forĵeti urinan sakon. Koncernaj fakuloj antaŭvidas, ke la medicina signifo de tiu operacio estas same granda kiel tiu de reunigo de rompita membro.

● Legendo diras, ke antaŭ 5 000 jaroj ĉinaj prapatroj Huangdi, Yandi kaj Chiyou kolektiĝis en Zhuolu, nordokcidenta Hebei-provinco, kaj tiamaniere efektiviĝis granda unuiĝo de la ĉina nacio kaj komenciĝis la ĉina civilizacia historio. Nun en Zhuolu ankoraŭ konserviĝas la ruino. Multaj en- kaj eksterlandaj ĉinoj venas tien. Por ekspluati la valorajn historiajn kulturajn riĉfontojn la gubernio Zhuolu speciale okazigis ĝeneralan projektan argumenta-

don pri turisma ekspluato de la urbeto Huangdi kaj planas efektiviĝon de la projekto.

● Geknaba *Uŝu*-a Lernejo apud Shaolintemplo, fama pro sia luktarto, en Henan-provinco, estas laŭdata de la geknaboj lernantaj tian luktarton.

La lernejo invitis, krom fakaj instruistoj, ankaŭ bonzojn, lertajn en *uŝu*-luktarto, de Shaolintemplo al la trejnado. Tie la lernantoj povas lerni ĉiujn element- kaj mezlernejajn kursojn tute samajn kiel en la ordinara lernejoj. Krome, ili sisteme lernas teorion pri *uŝu*-o, Shaolintuktarton, kinezo-medicinon k.a.

● Iu metiisto de Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco faris violonon el jado 1.5 kg pezan. Fakuloj provludis ĝin kaj trovis, ke la melodio produktita de ĝi estas harmonia, bela kaj distingiga.

### SOCIO

● Por kontentigi la ĉiam kreskantan bezonon de diversaj sociaj tavoloj pri leĝaj servoj, en la lastaj tri jaroj aperis en Ĉinio 7 200 advokataj servoj kun pli ol 90 000 advokatoj, kiuj egale konkuras, akcelas unu alian kaj kune progresas.

● Ekde la unua de aŭgusto 1996 Ĉinio impostas pakaĵojn de enlandigaj pasaĝeroj kaj privatajn poŝtaĵojn laŭ la nova regularo, kiu difinas, ke la limimposta procentaĵo ĝenerale malaltiĝis, t.e. tiu de teksaĵoj, elektroaparatoj, fotiloj, bicikloj kaj brakhorloĝoj reduktiĝis de 50% al 30%, tiu de videoregistratoroj de 100% al 80% kaj tiu de cigaredoj kaj alkoholaĵoj de 200% al 100%.

● En Ĉinio la maljunulejoj antaŭe akceptis nur seninfanajn kaj senvivrimedajn gemaljunulojn. Nun ili akceptas ankaŭ urbajn maljunulojn je ilia propra pago.

En 2000 sole en Pekino la nombro de maljunuloj atingos 1.6 milionojn, kiuj konsistigos 14.8% de la totala loĝantaro de la urbo. Sekve de tio establi kaj perfektigi la sociajn maljunulajn organizojn fariĝis neignorebla problemo en starigo de socia garantio-sistemo.

● La Ŝanhaja Zoo sukcese reproduktis elefantan familion el tri generacioj.

La 31-jara "avo" kaj la samaĝa "avino" havas 6 idojn. Ilia dua filino jam estas 14-jara kaj havas 3-jaran idon. Oni diras, ke elefanta familio el tri generacioj estas malofta en la mondo.

# Fabriki ilmaŝinojn per komputero

**J**AM ne estas novaĵo fabriki ilmaŝinojn per komputero. Tamen ne ĉiuj entreprenoj atingis grandajn sukcesojn en la intensa merkata konkurenco. La Unua Pekina Ilmaŝina Fabriko, kiel la plej granda el la ĉinaj frezmaŝinaj entreprenoj, kontribuis por tio kaj en 1995 fabrikis produktaĵojn, tre ŝatatajn en la merkato.

La fabriko, 40-jara, situas en la orienta parto de Chang'an-strato,


Pekino. Ĝiaj produktoj havis grandan debiton en pli ol 50 landoj kaj regionoj. Tamen tio estas malpli ĝojiga ol la nuna situacio. Nun la fabriko aspektas tute nova. Multaj alilandaj fakuloj laŭdis ĝin en la vizitado. Iu el ili deziris rigardi la tutan proceson de la projektado ĝis la fina laboro kaj desegnis skizon de peco postulant-bori truon en la mezo de iu plato, frezi ĉirkaŭ la truo ringoforman kanelon, fari sur ĝi simetrie 5 boltingojn kaj fari sur ĝia

reverso la saman kanalon. Laboranto de la fabriko tuj funkciigis la komputeran sistemon. Kiam la fakulo venis al la laborejo, duonprodukto de la peco estis jam portita per aŭtomata ĉareto al fleksebla fabrikad-sistemo. En 2 horoj, peco de frezmaŝino estis farita laŭ la skizo.

Fakte, la prilaborado de la supre menciita maŝinpeco prezentis nur parton de ĝia "komputera integr-fabrikada sistemo", kiu nomiĝas CIMS internacie. Ĝi ampleksas administran inform-sistemon, inĝenier-projektan integr-sistemon, fabrikadan aŭtomatan sistemon, kvalit-administran reg-sistemon kaj sistemojn de datenbanko kaj reto. Subtenate de la datenbanko kaj reto, la komputera integr-fabrikada sistemo povas produkti sen desegnaĵo pecojn de ĝiaj projektado, teknologia ellaborado, ciferegado kaj portado de duonprodukto al fleksebla fabrikad-sistemo.

En la komputero regcentro de la Unua Pekina Ilmaŝina Fabriko ni vidis la skemon de CIMS. Ĝi, simila al la nerva sistemo de la homoj, ĝia regcentro — al la homa cerbo kaj la transmisa reto — al *ĝingluo*-vojoj en la homa korpo. Oni enmetas ĉiujn instrukciojn en koncernajn komputerojn kaj la transmisa reto sendas ilin al diversaj laborunuoj, kaj la diversaj terminaloj resendas sian laboron al la regcentro. La administranto povas manipuli ĉion en la regcentro. Li povas per komputero elekti projekton, dissendi laborplanon kaj efektiviĝi optimumon kaj labordividon de peco-

En la laborejo de fleksebla fabrikad-sistemo



Fakuloj de SME en la ilmaŝina fabriko



prilabora plano por apartaj laborejoj kaj kontroli la ricevadon kaj sendadon de materialoj laŭplane. Dume laborantoj en la laborejo povas vidi sur komputera ekrano sian taskon, koni la teknologiajn postulojn, rigardi la laborproceson...

S-ino Yang, ĉefingeniero de la komputera centro, diris: "Administrado, projektado, ekspluato kaj prilaborado de produktoj decidas la konkurpovon en la merkato. Antaŭe oni devis desegni la projekton sur papero kaj pro malgranda ŝanĝiĝo de donitaĵo oni devis denove desegni la projekton. Nun ni havas inĝenier-projektan integr-sistemon. Se nur la projektisto komputere korektis donitaĵojn de peco, ĝia nova produktometodo tuj transmisiigis al la laboristoj. Aplikante la fabrikadan aŭtomatan sistemon sur la fleksebla fabrikada sistemo, oni rapide muntas ilmaŝinon el miloj aŭ dekmiloj da pecoj. La sistemo ankaŭ ebligas ŝanĝi produktotipon en mallonga tempo konforme la bezonon de la merkato."

En la laborejo de fleksebla fabrikad-sistemo ni vidis produktadon de malsamaj ilmaŝinoj en la sama tempo kaj sur la sama labor-sistemo. La roboto mem elektas, ŝanĝas kaj manipulas tranĉilojn

kaj senlace faras prilaboradon de pecoj unu post alia. Manipulanto ĉe la komputero konigis: "La plej granda supereco de komputero estas seriozeco. Se nur oni enmetas ĝustajn informojn, la kvalito de prilaboritaj produktoj estas centpocente garantiata."

CIMS mallongigas la ekspluatitan periodon je 1/3-1/2 kaj 4-8-obligas la prilaboran efikecon. Krome, la ekzakteco de prilaboritaj pecoj multe altiĝis. Samtempe kun tio, ĝi surrigis la administradon de la fabriko sur pli sciencan vojon, havigis al ĝi pli racian materialan aranĝaĵon, pli altan rapidecon, pli malaltan produktokoston kaj pli bonan kvaliton, kaj kompreneble pli grandan konkurpovon. Antaŭe, la struktura komplekseco de la produktoj, tro granda bezono de specoj kaj materialoj estigis tro grandan stokon, kiu stagnigis grandan cirkulan kapitalon. Apliko de la fabrikad-rimeda plano, la stato multe pliboniĝis. En 1993 laŭ la merkata postulo kaj informoj liveritaj de komputero la fabriko pliproduktis 389 ilmaŝinojn kaj pliigis la enspezon je 40 milionoj da juanoj. En la produkt-rimeda administrejo oni diris emocie: "Antaŭe ni devis mem serĉi materialojn en la tenejo. Nun se nur

ni frapas la klavojn, tuj vidiĝas stoko-listo sur la ekrano."

En adjudikado komence de la 90-aj jaroj la fabriko estis venkita de la rivalo pro produkto-donado malfrua je 5 monatoj. Aplikante CIMS, ĝi ne plu ĉagreniĝis pri la produkto-periodo. En 1995 la fabriko ekspluatis ĉ. dek specojn da ciferegaj ilmaŝinoj. En la Internacia Ilmaŝina Foiro okazinta septembre de la sama jaro en Pekino la fabriko ekhavis grandan sukceson. Ĝi gajnis konfidon de entreprenistoj de Germanio kaj Japanio kaj akiris la ŝancon kunlabori kun ili por fabriki novajn produktojn. En la sama jaro, post kiam la fabriko gajnis la industri-an iniciatan premion de SME, ĝi gajnis ankaŭ industri-an disvolvan premion de UNIDO por 1995 en Vieno. Preskaŭ samtempe kun tio, en internacia adjudikado pri 500-tuna speciala frezmaŝino por padelo de hidroturbino la fabriko akiris la adjudikon per la promeso, ke post 18 monatoj ĝi donos la produkton.

Oni povas diri, ke apliko de la avangarda internacia tekniko CIMS rejunigis la grandan ŝtatan entreprenon la Unua Pekina Ilmaŝina Fabriko. Ĝi ankaŭ donis utilan sperton por ke iuj entreprenoj eliru el entreprenada malfacilo. ■

YANGZHEN\* kaj XIONG LI:

# Kiom da infanoj en tibeta familio?

**C**I-JUNIE ni office vizitis iun vilaĝon de Tibeto. Tuj ĉe la enirejo de la vilaĝo amaso da viglaj infanoj altiris nian atenton. Vilaĝano Cidan Wangjia

babilis kun ni pri infanoj kaj nasiko. Li estis forĝisto. Li diris, ke en la vilaĝo estas nur 44 familioj tamen kun multe da infanoj. Ĝenerale unu familio havas kelkajn infanojn, eĉ 7 aŭ 8. La 40-jara Cidan

malkaŝe diris al ni: "Kvankam la registaro ne konsilas al tibetanoj steriligan operacion, tamen ni jam havas tri knabojn kaj unu knabino, do ni mem alprenis preventan rimedon." Cidan diris ankaŭ: "Nia

## Orkideo kaj bambuoj

de HUA JIE

La pentraĵo "Orkideo kaj Bambuoj" estis farita en 1762. Ĝi estas unu el la famaj verkoj de eminenta ĉina pentristo Zheng Xie (1693-1765) en Qing-dinastio (1644-1911).

Li nomiĝis ankaŭ Zheng Banqiao. Li estis lerta ankaŭ en verkado de poemoj kaj prozaĵoj. Li iam funkciis kiel guberniestro. Pro helpo al malriĉaj kamparanoj suferantaj de natura katastrofo, li ŝokis lokajn tiranojn kaj estis eksigita. Post tio li vivtenis sin per vendo de siaj pentraĵoj. Li estis lerta en pentrado de diversaj orkideoj, bambuoj kaj rokoj. Tradicie ĉinaj pentristoj ĉiam rigardas pentradon de orkideo kiel esprimon de sia nobleco kaj ermiteco kaj pentras bambuojn por montri sian virton kaj bildigas rokojn por esprimi sian henestecon. Kaj Zheng Xie diris: "Mi pentras orkideojn, bambuojn kaj rokojn por ĝuigi la laborulojn, sed ne por plaĉigi al la riĉuloj." Li levis la penson de la ĉinaj pentristoj al pli alta nivelo.

Pro tio ni facile komprenas la aludon de tiu pentraĵo. Per kelkaj strekoj la aŭtoro vivece aperigis du bambuojn sur la papero. Unu alte staras kaj la alia, kompare malalta, sin kroĉas al ĝi. Ili ambaŭ aspektas malcedemaj en forta vento kaj densa pluvo. Maldekstre de la mezo de la papero prosperas bela orkideo. Ĝiaj folioj flirtas, dum ĝia floro kvazaŭ dissendas aromon. El tio ni klare vidas la noblan pentriston, kiu zorgis pri la popola vivo kaj ne submetiĝis al la despotaj aŭtoritatoj. La orkideo kaj bambuoj estas ankaŭ speguliĝo de la nobleco de la aŭtoro mem.

vivo estas pli bona ol tiu de aliaj vilaĝanoj, dank' al malmulteco de infanoj."

Oni scias, ke en la 70-aj jaroj Ĉinio ekpraktikis la politikon de naskolimigo laŭ siaj propraj cirkonstancoj kaj dekomence faris pro tio diferencon inter la regionoj de Han-nacio kaj nacimalplimultoj. La tibeta registaro sekvas la principon: doni gvidon kaj servon al sia popolo laŭ ties deziro.

Ni kontaktiĝis kun nemalmultaj tibetaj virinoj kaj oficistoj, kiuj prizorgas naskolimigon, kaj rimarkis, ke la temo de naskolimigo ĉiam interesas ilin. Foje parolante pri naskolimigo, Zhaxi Langjie, oficisto de la Tibeta Higiena Oficejo, diris, ke de 1980 la politiko de naskolimigo estas praktikata inter la hanoj, kiuj loĝas en Tibeto. En 1985 oni komencis propagandi inter la tibetaj kadroj kaj urbanoj, ke unu geedza paro havu maksimume du infanojn. Sed al la kamparo, kies loĝantaro konsistigas 85% de la totala loĝantaro de Tibeto, oni ne faris limigon.

Laborantoj pri naskolimigo donas informojn, konsultiĝon kaj sciojn pri kontraŭkoncipo kaj avantaĝo de naskolimigo. Fakte, la ĉefa celo estas protekti la sanon de virinoj, efektiviĝi eŭgenikon kaj altigi la kvaliton de la popolo.

Fratinoj Danzeng kaj Cizhuoma el Zhaji-vilaĝo jam havas infanojn. Februare de tiu ĉi jaro ili ĉeestis kurson pri virina familia eduko, kiu celis altigi la kvaliton de virinoj, doni al ili sciojn pri ilia familia eduko kaj higieno kaj kulturi ilian kapablon guberni infanojn. Cizhuoma diris: "La instrua programo estas praktika, konigas al mi la rolon kaj respondecon de patrino en familia eduko kaj donas al mi sciojn pri protekto de sano, prevento kaj traktado de ordinaraj infanaj malsanoj, simpla urĝa savo kaj kulturado de emo de

infanoj al higieno."

Kursgvidantino Taji prezentis sian ekzemplon por instrui la kurसानojn. Per bildoj, ciferoj kaj surbendigitaj infankantoj kaj popolkantoj ŝi klarigis al ili, kiel instrui antaŭlernaĝajn infanojn pri arto, lingvo, nombrado, legado kaj skribado. Ŝi diris: "Post trejnado virinoj altigis sian propran kvaliton kaj akiris sciojn pri scienca gubernado, kio profunde influos la kvaliton de la tibeta popolo."

Vilaĝaj kuracistoj ludas gravan rolon en la tibeta naskolimigo kaj sanprotekto de virinoj kaj infanoj. Basang estis unu el ili. Krom diagnozo, li faris ankaŭ sanprotektan servon al virinoj kaj infanoj de sia distrikto. Li inokulis infanojn 12-18-monatajn kontraŭ pneŭmonio, poliomjelito, kokluŝo, difterio, tetanoso kaj morbilo. Ĉiu inokulo estis senpaga. Laŭ registro Basang anoncis en ĝusta tempo gepatrojn, ke ili akompanu siajn infanojn por inokuli.

En Tibeto estas grupo, konsistanta el ŝtatifacistoj kaj kuracistoj, kiu ĉiujare vizitas vilaĝojn por inspekti la planizitan imunigan laboron. Ili kontrolas la notojn de vilaĝaj kuracistoj, la tempon kaj proceson de inokulado, la pozicion de vakcinado BCG. Plejmulto de la vilaĝaj kuracistoj laboras serioze. 95% de ilia vakcinado atingis la normojn. Dank' al tio la infana mortokvanto malkreskis de 43% en la 50-aj jaroj al 9.2% en 1989. La averaĝa vivdaŭro kreskis de 33.5 jaroj al 60 jaroj.

Laŭ statistiko, en la lastaj 40 jaroj la loĝantaro de Tibeto ĉiujare kreskis averaĝe je 1.7%. La naskipovaj virinoj en la tibetaj urboj naskas averaĝe 3.8 infanojn, pli multe ol tiuj en la aliaj regionoj de la lando. En la vilaĝoj preskaŭ 50% de la geedzaj paroj havas po pli ol 4 infanojn. ■

\*Tibetanino





日、紅橋、蘭、酒、危、家、桃李、艷、芳  
 娑、閑、所、只、是、一、枝、蘭、竹、留、得、春、光、過、好  
 孔、隆、壬、午、板、橋、鄭、燮





Antikva templo en aŭtuno

Foto de LIU SIGONG

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九六年第十二期  
(本刊代号:二—九一五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2